

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2009

2

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2009. №2 (172)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2009

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 450 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 700 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2009.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2009, №2 (172).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 19 января 2008 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Nia civilizo similas ĉielskrapan domon. Ju pli da etaĝoj, des malpli da kontakto kun firma grundo. Giganta skatolo el ŝtalo kaj betono rajtas, cetere, havi sian propran firmon. Pumika, ĝi sorbas en siajn porojn diversajn tentojn de komforto, ĝi kapsuligas siajn vivajn inkludaĵojn en certaj ĉeloj de ekzisto, durlotas ilin en tiuj luliloj de bonstato, igas ilin rozaj, molaj, subtilaj, pasivaj kaj konsumemaj. *Homo sapiens* el sia teretaĝa pasinteco kaj *homo consumens* sur sia civiliza alto formas specifan “duon en unu” kun variaj riskoj por la unua elemento. Foje okazas, ke en la domo rompiĝas la lifto aŭ averias la elektrokonduko. Tiam la komforto tuj forfluas el la ĉeloj, kaj iliaj loĝantoj rememoras pri la natura grundo.



Ŝajne, la konsola senco de ĉiu ampleksa ekonomia krizo, sen escepti la nunan, konsistas en tiuj *rekondukoj al la tero*. La krizo malkovras kadukajn lokojn de la konstruo, aludas pri la sekureco de pli horizontala baziĝo, prezentas al rekta observo tiun saman teron, kiun oni vidis antaŭe plejparte elfenestre kaj traekrane. Verŝajne, tia tero timigas. Ne sole per siaj sociaj pasioj aŭ per la “idiotismo de la vilaĝa vivo”. Ja la altkreskaĵoj elsuĉas, ombras, kripligas la grundon. Kaj la sukoplenaj ĉeloj ja kondiĉas elĉerpiĝon del fortoj.

Certe, la loĝanto de la ĉelo ne malscias tiujn riskojn. Li ne deziras perdi solidan apogon. Li imitas la teran vivon en la betonkubo de sia apartamento. Li plantas florojn, prizorgas katon kaj realigas virtualajn promenojn sur sia sporta biciklo sen radoj, kiu trejnas liajn krurojn-femurojn. Por ne tro grasiĝi li promenas ankaŭ surstrate aŭ enparke en speciala loko ne tre ŝoka. Kiel naturamanto li ŝatas programojn pri birdoj kaj bestoj...

En la ekonomia projekcio, la ĉelano ankaŭ ne indiferentas. Li subtenas la ideon pri pli respondeca spekulado kaj pli efika kontraŭmonopola kontrolo. La bildo de la biciklo sen radoj taŭge transdonas la veran signifon de tiuj bonaj aspiroj: ili havas medicinan — memtrankviligan — efekteton.

Du-tri bildojn tragikomedijajn por komenci. Ion pli mi apenaŭ povus prezenti ĉi-momente. “La komparoj lamas”, bilda asociado ne povas anstataŭi senperan esploron. Tamen.

Tamen tiu bildo de ĉielskrapanto aŭ, se vi volas, la skemo de produkta-konsuma vertikalo helpas ne perdiĝi en detaloj, se mi deziras vere esplori la kaŭzojn de la krizo. Nur, por ke oni aprecu la potencialon de tiu simbolo, mi aldonu al la skema vertikalo jenan bildan nuancon: imagu la kapitalon kiel *pezon* agantan trans la surfacon de sia apliko; imagu, kia mortiga premo aperas en ĝi, kiam ĝi — koncentrita ekstreme bas-alten — kontaktas iupunkte la grundon.

Ĝuste la superpremo, ne nur al grundo, sed streĉanta la tutan konstruan bazon, estas la serĉata faktoro detrua, tiu eterna inkognito de niaj ekonomiaj orakoloj.

Alen Kris

Sur la kovrilo estas parto de tiuj kuraĝuloj, kiuj en la unua semajnfino de la jaro, malgraŭ krizoj kaj premoj, sukcese grimpis sur la monton Poludnica. (*Fotis Ján Vajs*)

Ilona Koutny: “Stari sur du piedoj”

Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro?

Kompreneble, mi ĝojis, ke plurjar-deka persista laboro portas rekonon. Kvankam mi jam al kutimiĝis al la 2-3a (same kiel la alia “eterna kandidato”, Renato Corsetti) dum la pasintaj dek jaroj. Mi miris tamen pri la unusenca sukceso (diferenco de ok voĉoj). Eble, ankaŭ la premio Grabowski, ricevita dum la lasta UK pro mia interlingvistika agado, pli turnis la atenton al mi.

Ĝis nun la Esperantisto de la Jaro ricevis je unu aŭ du voĉoj pli multe ol la aliaj kandidatoj. Eĉ Bill Auld venkis nur per du pliaj voĉoj. Nur Povilas Jegorovas en 2005 havis je kvar voĉoj pli ol la dua kandidato. Sed vi senprecedence ricevis je ok voĉoj pli multe ol la dua kandidato (kvankam vi ne rajtis voĉdoni por vi mem)!

Nu, jam aperis PIV kaj PMEG. Kvankam la apero de la anglalingva literatura enciklopedio de Geoffrey Sutton estas grava afero en 2008 (profesoro pri kompara literaturo en UAM estis ravita pro ĝi!) Ĉiuj tiuj estis la fruktoj de plurjara serioza laborado. Ankaŭ la KD-oj de Petro Baláĝ estas tre utilaj. En mia kazo, eble maturiĝis la situacio per la dekjarigo de IS.

Vi estas elektita “pro la kompetenta kaj sukcesa gvidado de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań”. Bonvolu koncize prezenti la Studojn.

La legantoj de *La Ondo* estas regule informataj pri la Studoj (vd. *LOdE*, 2008, №11 k.a.), do mi rememorigas nur pri kelkaj gravaj punktoj.

— La postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj (IS) estis fonditaj en 1997 laŭ mia iniciato kaj ekfunkciis en la studjaro 1998/99 laŭ la modelo de la postdiplomaj studoj de la Esperanto-fako de ELTE (Eötvös Loránd Universitato) en Budapeŝto, kie mi laboris preskaŭ dek jarojn antaŭ ol ekloĝi en Pollando. (Kun bedaŭro mi rimarkigas, ke jam entute ĉesis la Esperanto-fako en Budapeŝto.)

— La studoj ĉe UAM estas destinitaj al esperantistoj, kiuj volas akiri profundajn konojn pri esperantologio kaj interlingvistiko, simile al filologiaj studoj de aliaj lingvoj. IS provizas ankaŭ per la bazoj de lingvistiko kaj komunikado necesaj por scienca traktado de Esperanto.

— La metodika specialiĝo en la tria



jaro havas gravan rolon en la formado de Esperanto-instruistoj.

— Pro la ekstera formo (nur po unu intensa surloka semajno dum ĉiuj ses semestroj) taŭgas por esperantistoj el diversaj landoj. La dumsemestra laboro okazas hejme kun retaj kontaktoj. Ni intencas intensigi elementojn de elektronika instruado.

— La internacia karaktero de la Studoj elstare ebligas komparan kaj interkulturan aliron al la problemoj.

La Studoj estis motivo por via preskaŭ ĉiujara kandidatiĝo, sed ĉi-jare aldoniĝis la unua komuna kurso de UAM kaj ILEI kaj la simpozio “Lingvistikaj kaj kulturaj aspektoj de interlingvistiko”. Pri kio temas?

Enkadre de la kunlaboro kun ILEI ni kune organizas instruistan trejnadon, kiu longe ne estis solvita en la movado. La unujara studado surbaze de la universitata programo inkluzivas du intensajn surlokajn sesiojn kaj fine de la studjaro kompleksan ekzamenon kun prezento de finlaboraĵo, post kiuj ILEI donas instruistan diplomon por la sukcesintoj.

Bedaŭrinde, tiu ĉi ebleco ne estas ankoraŭ sufiĉe konata en Esperantio. Nur per tio mi povas klarigi, ke la duan fojon, ĉi-septembre ni ne povis ĝin startigi pro manko de sufiĉe da interesiĝantoj.

La interlingvistika simpozio en la lasta septembro celis festi la dekjaran funkciadon de IS. Feliĉe, krom la prelegantoj kaj gestudentoj de IS partoprenis ankaŭ aliaj interesiĝantoj pri interlingvistiko kaj esperantologio, entute 85 homoj el 22 landoj kun 32 bonnivela prelegoj (vd. *LOdE*, 2008, №11).

Ĉu vi kunlaboras kun aliaj Esperanto-edukejoj kaj klerigejoj?

La kunlaboro en nia malgranda medio estas tre grava por proponi kiel eble plej multflankan, altnivelan kaj interesan studprogramon. Al la programo de IS kontribuas polaj kolegoj (Lidia Ligeza, Maria Majerczak, Tomasz Chmielik) kaj konataj fakuloj el diversaj landoj (Detlev Blanke, Vera Barandovská, Michel Duc Goninaz, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Katalin Kováts, Aleksander Melnikov, Humphrey Tonkin, Balázs Wacha, John Wells). Mi dankas ankaŭ al la surlokaj kunlaborantoj: Michael Farris kaj Zbigniew Galor, mia edzo.

Krom ILEI, ni kunlaboras kun Edukado.net. Katalin Kováts respondecas pri la instruista specialiĝo kadre de IS, la bonajn taskojn kaj la diplomverkojn de la gestudentoj ŝi aperigas en Edukado.net. Tiel la fruktoj de la studoj tuj estas alireblaj ankaŭ al pli vasta publiko. Ni estas malfermitaj al AIS. Vera Barandovská-Frank gvidas kurson pri interlingvistiko, kaj seminariaj laboraĵoj aperas en *Grkg Humankybernetik*.

La bonaj literaturaj eseoj aperos en *Spegulo*, pri Esperanto-movado en *La Ondo*. Tiel IS stimulas la fakan verkadon. Cetere ankaŭ la libro *Lingvo kaj popolo* de Humphrey Tonkin naskiĝis el lia kurso por IS. Verŝajne al la finpretiĝo de via *Historio de Esperanto* kontribuis ankaŭ la testado kun gestudentoj de IS. La uzebleco dum la studoj spronas ankaŭ Aleksander Melnikov produkti esperantlingvajn variantojn el sia lingvo-kultura disertaĵo.

Ni volas instali regulajn kontaktojn tra la eŭropa Erasmus-projekto. UAM nun subskribas kontrakton kun la Brusela Universitato (Kristin Tytgat) kaj Kaŭna Universitato (Aida Čižkaitė), sekva plano estas kunlaboro kun la Universitato en Rostov-na-Donu (Aleksander Melnikov) kaj eventuale kun la Universitato en Luĉk (Nina Daniljuk).

Ĉu vi ricevas materian, informan kaj moralan helpon de esperantistaj kaj neesperantistaj asocioj, instancoj kaj individuoj?

La unuaj jaroj estis malfacilaj, ĉar el nenio necesis krei la studojn kaj altiri partoprenantojn. Dankon al la kolegoj, kiuj jam tiam pretis veni kaj gvidi kursojn (John Wells, Vera Barandovská, Balázs Wacha, István Ertl, Humphrey Tonkin) kaj al la persistaj gestudentoj.

Ekde 2002 la stipendioj de ESF ebligas kovri la studkotizojn de kelkaj gestudentoj. Dank' al la subteno de ESF ni povis organizi senpagan jubilean simpozion kaj eldonos la unuajn lernolibrojn de la studoj ĉi-jare.

Ankaŭ kelkaj esperantistoj helpis en la disvolvo de IS: Mila van der Horst-Kolińska subtenis per stipendio polan partoprenanton; Helga Farukuoye donacis multajn librojn, Zbigniew Czupkaĵo kaj Johann Pachter jarkolektojn de revuoj; libropakon donacis ankaŭ UEA kaj CDELI (La Chaux-de-Fonds). Tiel ekstis nia modesta biblioteko. Dankon al ĉiuj donacintoj!

Koncerne la diskonigon helpas la Pola Radio kaj revuoj kiel *Esperanto*, *IPR* kaj *La Ondo de Esperanto*.

Dankon pro la mencio de La Ondo, sed kion, laŭ via opinio, La Ondo kaj aliaj gazetoj nesufiĉe atentis?..

Gazetoj kaj entute Esperantio ne sufiĉe atentis, ke necesas subteni pli forte tion, kio jam ekzistas — niakaze la unikan universitatan programon — kaj ne ĉiam batali por novaj celoj.

Esperanto ne enestas en nia normala edukado, tiel la scioj de averaĝaj esperantistoj povas esti unuflankaj: ekzemple, tute povas manki konoj pri la Esperanto-literaturo aŭ movadhistorio. IS provizas la partoprenantojn per konoj kaj kapabloj el diversaj flankoj de la Esperanto-kulturo helpe de elstaraj fakuloj. Ĝi formas kompetentajn instruistojn, kiuj povas prave proponi instruadon de Esperanto en diversaj lernejo-tipoj. Ne forgesu, ke la dezirata grandskala enkonduko de Esperanto en la instruadon bezonus kvalifikitajn instruistojn!

Kelkaj ne komprenas la gravecon de universitata instruado, inter ili *Libera Folio*, kiu eĉ ne raportis pri la dekjarigo de IS. Sed eble mi ĝoju, ke okazis neniun skandalon, pri kiu indus raportoj.

Ĉu oni povas paroli pri (mal)progreso de Esperanto? Kiuj pozitivaj kaj negativaj tendencoj aperis post la centjarigo de Esperanto?

Mi dirus, ke temas pri *dinamika stagnado* — la suma nombro de esperantistoj ne kreskas, tamen okazis kaj okazas ŝanĝoj en la esperantistaro. Post la reĝimŝanĝo en orient-eŭropaj landoj multaj malaperis el la movado, ĉar ili devis pli forte zorgi pri la vivtenado, krome aperis novaj eblecoj, eblas pli facile vojaĝi kaj la pozicio de la angla en internaciaj rilatoj pli kaj pli fortiĝas.

Aliflanke, la interreto malfermis novan epokon ankaŭ por Esperanto. Ĝia esenca rolo en la komunikado inter

malsamlingvanoj povas nun preskaŭ senlime plenumiĝi. Ekzistas impone multaj retejoj kaj diskutejoj dediĉitaj al iu aŭ alia flanko de Esperanto (pri instruado, literaturo, pri organizaĵoj, ludoj ktp. ktp.). La tradicia klubvivo eble malpli floras, sed ja la retforumoj kaj tie la internacieco estas tute natura.

Hazarda retumanto povas trafi Esperanto-paĝojn kaj eĉ lerni la lingvon, (ekzemple, ĉe Lernu.net). Estas gravaj la artikoloj en *Vikipedio*, la Esperanto-variantoj de multaj disvastiĝintaj programoj (*Linux*, *Firefox*, *Skype* k.a.). Ankaŭ *Windows* havas Esperanto-literatiparon. Esperanto jam ne estas neglekt-ebla.

Tamen malgraŭ la pli grandaj eblecoj kaj intensaj informkampanjoj (ago-tagoj kaj -semajnoj, lingvaj festivaloj), verŝajne malpli da homoj aŭdis pri Esperanto ol antaŭe pro la lavango de informoj.

Kutime ni demandas la laŭreacitojn, ĉu la esperantista agado malhelpas al la profesia laboro; sed por vi ĝi estas esenca parto de la universitata laboro, ĉu ne?

En mia ĝisnuna kariero mi plurfoje estis plentempa profesia esperantisto: mi laboris kiel redaktisto de la Scienca Eldona Centro post la UK en Budapeŝto, poste kiel instruisto de la Esperanto-fako de ELTE, posteulo de prof. Szerdahelyi. En aliaj periodoj Esperanto estis aldona, sed tamen profesia okupo (vortaroj, parolsintezo, komputile asistataj lingvoinstruaj programoj).

Nun mia ĉefa tasko en UAM estas la instruado de hungaraj lingvo kaj lingvistiko kadre de la Hungara fako, la organizado kaj instruado kadre de la Interlingvistikaj Studoj estas aldona tasko.

Mi konsideras, — kun bedaŭro — ke esperantista fakulo devas “stari sur du piedoj” por esti akceptata en faka medio, t.e. ne nur en esperantologio produkti ion, sed ankaŭ en alia tereno. Ĉe mi temas pri komputa lingvistiko. Sed estas malfacile progresi en du terenoj. Ankaŭ mia habilitiĝo (duagrada doktoriĝo, kiu estas la kondiĉo por profesoriĝo en Pollando) okazas pli malfrue ol la universitato tion atendis de mi. Tamen la jaro 2008 ankaŭ el tiu vidpunkto estis grava jaro por mi: aperis libroforme mia disertaĵo (anglalingva analizo de la hungara lingvo por la celoj de parolsintezo kun rimarkoj pri Esperanto kaj resumo en Esperanto).

Cetere por ekvilibro, mi aperigis ankaŭ la Germanan-Esperantan-Polan etvortaron pri Lingvo kaj Komunikado kunlabore kun miaj gestudentoj (Cyril

Brosch, Maciej Jaskot, Horst Vogt). Feliĉe, en miaj lingvistikaj esploroj kunplektiĝas la traktado de Esperanto kun tiu de aliaj lingvoj. Tio estas akceptata en lingvistika medio.

Vi estas la unua virino, kiu iĝis la Esperantisto de la Jaro. Ĉu tio reflektas la dominadon de la viroj en Esperantujo?

Se oni rigardas la klubojn aŭ kongresojn, tiam oni vidas multajn virinojn. Se temas pri gvidaj roloj, sed eĉ pri literaturo, jam videblas la vira plimulto. Eble ili havas pli da tempo? Mi ne sentas diskriminacion pro mia virineco. Pli kaj pli da virinoj distingiĝas (Katalin Kováts, Spomenka Štimec, Anna Löwenstein, Zofia Banet-Fornalowa, Perla Martinelli, por nur mencii kelkajn). Mi bone kunlaboras kaj kun viroj kaj kun virinoj.

Vi ne evitos respondi niajn du tradiciajn demandojn. Unue, kiujn tri librojn en Esperanto vi kunprenus al neloĝata insulo?

Verŝajne PIV, ja en ĝi ĉiam eblas ion ekscii kaj kritiki... kaj iujn beletraĵojn, ĉar kutime mi apenaŭ havas tempon por tio, do ion de Claude Piron, Trevor Steele kaj de Spomenka Štimec.

Laste, sed neeviteble: viaj planoj.

Mi ĉiam havas pli da planoj ol tempo kaj ankaŭ la jaro 2009 estos tre densa. Jen la plej gravaj:

— kun miaj eksgestudentoj mi pretigas la germanan-esperantan-polan version de la *Etvortaro pri Lernado kaj Laboro* por la Germana Kongreso fine de majo. Cetere mi jam laboras pri sekvaj temoj, ja ordigo de la mondo — almenaŭ en vortara nivelo — estas interresa tasko;

— mi redaktas *memorlibron al prof. István Szerdahelyi*, kiu inicis min en Esperanton, kun kiu ni laboris pri la *Hungara-Esperanta vortaro*, kiu estus 85-jara en tiu ĉi jaro. Mi volus prezenti ĝin dum UK en Bjalistoko;

— post 10 jaroj da praktiko maturiĝis la situacio por lanĉi la lernolibrosieron de la Studoj. La unua volumo, kiun mi redaktas kaj grave kontribuas, temas pri *Kulturo kaj komunikado*, ĝi devus aperi por UK aŭ plej malfrue por la aŭtuna interlingvistika sesio kaj jubilea Arkones;

— mi intencas daŭrigi esplorojn pri la rolo de Esperanto en interkultura komunikado, se eblas, kune kun alilandaj kolegoj...

Sed nun estas tempo por pretigi la sekvan interlingvistan sesion, kiu okazos komence de februaro.

Intervjuis **Aleksander Korĵenkov**

La verda mondo festas la Zamenhofan Tagon!



Germanio. Je la Zamenhofa Tago, 15 dec 2008 estis inaŭguritaj tri novaj grandaj esperantlingvaj informtabuloj ĉe kajoj de la fervoja stacidomo en la Esperanto-urbo **Herzberg**. Partoprenis la fervoja ĉefo Detlev Krusche, urbestro Gerhard Walter, fervojistoj, ĵurnalistoj kaj Esperanto-amikoj el Herzberg. La fervoja ĉefo ĝojis, ke Herzberg nun estas oficiala Esperanto-urbo. Jam antaŭ pli ol 30 jaroj li aŭdis, ke homoj en Herzberg praktikis Esperanton sub gvido de la tiutempa staciestro, esperantisto Joachim Gießner. Walter kaj Krusche emfazis la unikan varbefikon kaj por la stacidomo kaj por la urbo kaj por Esperanto. (ICH)

18 dec 2008 la distrikta parlamento de **Lichtenberg von Berlin** decidis doni al la sennoma parko apud la Esperanto-domo la nomon "Zamenhofpark". Krom tri neonaziaj deputitoj, reprezentantoj de ĉiuj aliaj partioj subtenis la ideon kaj voĉdonis por ĝi. Zamenhofparko en Berlino estas la dua Zamenhofparko en la mondo laŭ esploroj en *Google*. Baldaŭ ni plantos 150 tulipojn kun la nomo Esperanto en la parko, por ke printempe ili elteriĝu florante. En julio estos malkovrita tabulo informanta pri Zamenhof kaj lia ideo kaj pri tio, ke la distrikto Lichtenberg von Berlin tiel oficiale honoras la 150-jariĝon de la nasko de la fondinto de Esperanto. (Johano Pachter)

Danlando. 15 dec en Kopenhago tri-deko da samideanoj kunfestis la Zamenhofan Tagon kaj la Tagon de la Libro. Birthe Trærup prelegis tre interese pri sia traduko de *Oriente* de H.C. Andersen kaj pri siaj traduk-spertoj. Nia libro-servo ekspoziciis aron de la plej noveldonitaj libroj kaj spertis sukcesan vendadon, sekvis gaja kantado de sezonaĵoj kaj agrabla bankedo. (Ileana Schröder)

Svislando. La semajnfino pri la 40-jariĝo de Kultura Centro Esperantista pasis 13 dec kiel sukcesa tago kun nefermitaj pordoj (inkluzivanta bankedon) kaj 14 dec kiel Zamenhofologia Tago sub la gvido de François Degoul, prezidanto de Scienca Instituto Zamenhof. Laborgrupo revizitis la temon "homaranismo", perspektive al eventuala okazigo en 2014 de tio kion Zamenhof revis kunvoki en 1914 al Svislando: la unua kongreso de homaranoj. Preparkunveno, kiu strebas arigi kiel eble plej multajn zamenhofologojn kaj interesojn pri homaranismo, okazos 17–21 aŭg 2009 en Ĉaŭdefono. (HeKo)

Hispanio. 13 dec en **Valencio** oni komencis festi la Zamenhofan Tagon en la sidejo de la loka E-grupo per saluto al la ĉeestantoj kaj klarigo pri la signifo de tiu evento. Poste okazis prelego pri Esperanto en Ĉinio, far Augusto Casquero, kun prezentado de fotoj kaj de video kun kantoj far ĉinaj esperantistoj. Poste ĉiuj iris al apuda restoracio kie oni povis gustumi tipe valencian manĝon. (Augusto Casquero)

En la placo Esperanto en **Zaragozo** 13 dec 2008 oni inaŭguris monumenton konsistantan el piedestalo kun ŝildo kronita per metala strukturo kiu reprezentas la terglobon. La ŝildo omaĝas la 100an datrevenon de la fondo de la Aragona Esperanto-Societo *Frateco*. La inaŭguro estis prezidita de la vicurbestro de Zaragozo, kun ĉeesto de multaj esperantistoj. (Toño del Barrio)



Harbino. Parolas Zhao Dong Wei, la estro de la Heilongjiang-a Socia Scienca Asocio.

Ĉinio. 19 dec en la Heilongjiang-a Scienc-teknologia Instituto en **Harbino** oni celebris la naskiĝdaton de Zamenhof, finon de Esperanto-kurso kaj la Novan Jaron 2009. Ĉeestis 120 studentoj, lokaj esperantistoj kaj gastoj. Post sinprezentoj kaj prelego de Yang Ren oni donis premiojn al la studentoj, gajnitaj parolkonkurson. Sekvis artaj programoj, kaj fine ĉeestantoj dancis, trinkis teon, manĝis dolĉaĵojn kaj ĝoje faris fotojn. (Song Ping)

Sian jarkunvenon kaj la Zamenhof-Tagon **Tianjin**-a Esperanto-Asocio okazigis 14 dec en la Centro de Tianjin-a Sociscienca Ligo. La kunvenon ĉeestis pli ol 60 asocioj, kiuj post raporto, diskutoj, akcepto de laborplano, prelegoj kaj disdono de premioj al aktivuloj, kunfotiĝis kaj kunmanĝis en la restoracio *Dengyinglou*. (Landa Agado)

Vjetnamio. En la sidejo de Vjetnama Unio de Amikecaj Rilatoj en **Hanojo**, Vjetnama Esperanto-Asocio (VEA) solene organizis Zamenhofan Tagon. Nguyen Xuan Thu, ĝenerala sekretario de VEA, legis la bilancon de la jaro 2008, listante plenumitajn taskojn kaj neankoraŭ plenumitajn farendaĵojn kaj prezentis la planon por la jaro 2009. Post aliaj parolantoj gejunuloj kontribuis per kantoj en Esperanto kaj allogaj dancoj en naciaj kostumoj. La kunveno finiĝis per kvizo. (Luong Ngoc Bao)

En la suda urbo **Ho Chi Minh** la Zamenhofan Tagon gastigis la Amikeca Domo. La kunvenon ĉeestis Huynh Minh Thien, estro de la urba Unio de Amikecaj Organizaĵoj. Tran Quan Ngoc rakontis pri la vivo kaj la verko de Zamenhof. Oni enmanigis membrokartojn al novaj membroj. La kunveno finiĝis per komuna fotado, apud granda portreto de Zamenhof. (Khuestelo)



Neide Barros Rêgo: la ĉefa figuro en la Zamenhofaj Tagoj en Rio.

Brazilo. Ankaŭ ĉi-jare la esperantistaro de Rio-de-Ĵanejro kaj ĉirkaŭaĵoj festis plurloke la Zamenhofan tagon. La unua festo okazis 14 dec en la najbara urbo **Niterói**, kie kunvenis ĉirkaŭ 50 samideanoj el Niterói kaj ĉirkaŭaĵoj kaj kie estis prezentitaj la portugala versio de la DVD de Djalma Pessata *La mond-civitano Zamenhof*, deklamado de poeziaĵoj, kantoj de Neide Barros Rêgo kaj kunfratiĝa tagmanĝo.

La sekvan tagon (15 dec) en **Rio-de-Ĵanejro** Eldona Spiritista Societo F.V.Lorenz okazigis feston omaĝe al la iniciatinto de Esperanto kun lanĉo de portugallingva verko pri esperantista ĉeĥa/brazila pioniro Lorenz, deklamado de poeziaĵoj kaj kantado.

Vendrede estis la vico de la festo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, kiu konsistis el parolado de la KKE-prezidanto, Givanildo Ramos Costa, omaĝe al Zamenhof, muzika spektaklo de Neide Barros Rêgo (kantistino) kaj Argemiro Spíndola (gitaro) kaj kunfratiĝa lunĉo, kun ĉ. 50 gesamideanoj.

Fine, dimanĉe, en suda kvartalo de Rio, **Botafogo** E-Nukleo organizis omaĝon al Zamenhof, kun la partopreno de Dirce Sales kaj Neide Barros Rêgo (du kantistinoj), Sylla Chaves, Givanildo Ramos Costa, Jair Salles kaj Aloísio Sartorato (partoprenantoj de la forumo "Disvastigado de Esperanto"). Partoprenis ankaŭ ĉ. 50 esperantistoj. (Aloísio Sartorato)

Ĉirkaŭ kvindek homoj en la sidejo de la Esperanto-Asocio de **San-Paŭlo** (EASP) kunfestis la tradicion Zamenhofan Tagon, kies programo konsistis el "Retrospektivo 2008", 40-minuta prezentado per multmedia projekciilo pri ĉefaj eventoj okazintaj dum la jaro; enmanigo de atestiloj por lernintoj de baza kurso; prezentado de kantoj kaj dancoj; kaj kunmanĝado de tipe kristnaskaj manĝaĵoj. Funkciis la asocia libroservo. (Jose R Tenorio)

Aŭstrio. La tradicia Zamenhof-festo en Vieno okazis 13 dec en la Pola Instituto. Herbert Mayer prelegis pri la Internacia Esperanto-Muzeo. Attila Schimmet kantis kelkajn kanzonojn. Petro Chrdle prezentis librojn. D-ro Hans Michael Maitzen mallonge prelegis pri Jubilea Jaro de Zamenhof. Poste oni spektis videofilmon el Bjalistoka Televido, kaj per kantado de la Esperantohimno finiĝis la oficiala programo. Fine oni povis ankoraŭ babiloj kaj refreŝiĝi ĉe bufedo. (Leopold Patek)

Israelo. En la Zamenhofa Festo kaj landa jarkunveno, okazinta en Tel Aviv 16 dec 2008, 46 partoprenantoj aŭdis raportojn pri la jara agado kaj elektis novan Estraron de ELI. Okazis libera debato pri la estonta agado, aparte pri pligrandigo de la nombro de la esperantistoj en Israelo. Sekvis du hebrelingvaj prelegoj pri Japanio. La arta parto enhavis kantadon de originalaj kaj esperantigitaj hebreaĵoj kaj deklamadon de memverkitaj poemoj. (Amri Wandel)

Pollando. 13–21 en Bydgoszcz okazis la tradiciaj Zamenhofaj Tagoj, riĉigitaj per Internacia Pedagogia Esperanto-Kurso kun inaŭguro de kursoj por vojaĝgvidantoj kaj ĉiĉeronoj. La ĉefa solenaĵo okazis en la kafejo *Eva*, kie la Zamenhofan feston preparis loka E-Klubo *Amiko* kaj Filio de PEA en Bydgoszcz. Dum la semajno okazis pluraj fakaj kursoj kaj prezentoj de diversaj instrumentoj. La Tagojn finis bakalaŭra-magistra seminario de AIS kaj finekzamenoj. (ISTK)

La Zamenhofan Tagon versajne iel festis ĉiuj esperantistaj kluboj kaj societoj. Ĝin menciis ĉiu esperantista gazeto, radio, podkasto kaj multaj blogistoj. Sed ĉi-jare ĝin menciis (eĉ se ne ĉiam en festa maniero) multaj naci-lingvaj amaskomunikiloj tradiciaj kaj retaj. Ni anticipe prepariĝu al la Jubileo de Zamenhof en decembro 2009!



Tajvano. Fraŭlino Je gvidas aerobikon.

Tajvano. Ĉi-jara Zamenhof-festo okazis 14 dec en la luksa pindonga kulturejo "Semaro-kafejo" kun pli ol 65 partoprenantoj. Post kantado de *La Espero* kaj legado de salutmesaĝoj pri "Mirindaĵoj de Esperanto-lando" prelegis prof. Cho Chaoming. Sekvis pliaj prelegoj kaj muzikaĵoj, skeĉoj de lernantoj, aerobiko, ekspozicio kaj libroservo. (Reza Kheir-khah)

Japanio. 6 dec en Tokio okazis Esperanto-Festo, alinome Zamenhofa Vespero, kiun kunorganizis ok Esperanto-grupoj kaj ĉeestis 68 homoj. Prelegis Ikeuti Hisao kaj Mireille Grosjean. Poste la ĉeestantoj diskutis en kelkaj tem-grupoj. Ne mankis kantado, prezentado de libroj kaj gaja bankedo vespera. (Syozi Keiko)

Bosnio kaj Hercegovino. En Banja Luka (Respubliko Serba) 8 dec en Popola kaj universitata biblioteko ekfunkciis ekspozicio "Esperanto, ponto inter la popoloj". Dek ĵurnalistoj vizitis la malfermon kaj raportis pri la ekspozicio, la ŝtata televido poste dufoje invitis esperantistojn. (Mico Vrhovac)



La redakcio de *La Ondo de Esperanto* kore dankas ĉiujn, kiuj sendis al ni siajn Zamenhof-Tagajn, Kristnaskajn kaj Novjarajn gratulojn kaj bondezirojn, kiujn ni volonte reciprokas!

Nova ZEO en Bjalistoko

Kiam en la jaro 2000 tiama urbestro de Bjalistoko decidis fermi la elementan lernejon *Ludoviko Zamenhof* №23, protestis ne nur ĝiaj instruistoj, sed ankaŭ multaj pollandaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Ili ne pensis pri manko de infanoj en la konvena aĝo sed emociiĝis pro la perdo de la simbolo de Esperanto en la naskiĝurbo de Zamenhof.

Legante alvokojn voĉdoni por la propono enkonduki Esperanton kiel la unuan fremdan lingvon en la lernejoj de Usono, mi tuj pensis pri ia simileco de la situacio. La demando de Barack Obama “Kion ŝanĝi?” estis direktita al civitanoj de Usono, ne al la monda esperantistaro.

“Multaj esperantistoj ŝajnas kredi, ke la rezulto de la reta voĉdonado efektive povus iel influi la politikon de la estonta prezidento de Usono... Vera desubismo bezonas ke oni agu loke”, — skribis *Libera folio* kaj mi konsentas kun tio.

Io simila okazis en Bjalistoko en la jaro 2000. Post ok jaroj infanoj, gepatroj kaj instruistoj de la plej nova elementa lernejo de Bjalistoko, kiu ankoraŭ ne havis patronon, direktis sin al ties krento — la Urba Konsilantaro de Bjalistoko — kun peto akcepti kiel la patronon Ludovikon Zamenhof. Ili sukcesis: la Urba Konsilantaro faris la konvenan leĝdecidon.

La 15an de decembro 2008 en ĉi tiu lernejo okazis solenaĵo, al kiu venis eminentaj gastoj kaj esperantistoj. Ĉiuj gratulis, donacis memoraĵojn kaj admiris belegan pentraĵon sur la koridora muro, sur kiu loka pentristo “ensorĉis” la frontonon de la estonta Zamenhof-Centro ĉe la strato *Warszawska 15* en la proporcio preskaŭ 1:1.

Post la vintra ferio en la lernejo Ludoviko Zamenhof №51 en Bjalistoko esperantistoj el la junulara rondo *Babelturo* organizos por infanoj la bazan kurson de Esperanto. Ĝin partoprenos ankaŭ kelkaj lernejoj instruistoj.

Favore al la situacio jam en marto al la naskiĝurbo de Zamenhof venos por unu jaro juna franca esperantista volontulo. Li lernos la polan lingvon kaj infanoj, kiuj jam intertempe iomete komprenos Esperanton, lernos danke’ al li la internacian lingvon. La lernado iĝos ankoraŭ pli interesa!

Ĉi tio okazis ne danke al alvokoj de mondaj esperantistoj sed danke al loka agado.

Elżbieta Karczewska



La nova lernejo Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko (Fotis Nina Pietuchowska)

En la naskiĝurbo de Esperanto

En Bjalistoko, la urbo de la 94a Universala Kongreso de Esperanto, 12–15 dec okazis la naŭaj Bjalistokaj Tagoj de Zamenhof.

La Tagoj komenciĝis je la vendreda vespero per arta prezentado de junaj artistoj el Bjalistoka Muzik-Lernejo. Sabate post kunsido de LKK de la 94a UK, en la urba biblioteko prelegis Przemysław Wierzbowski, Tomasz Chmielik kaj Roman Dobrzyński.

Posttagmeze ĉe la monumento de Zamenhof kronflorojn lasis nome de la Urba Estraro Aleksander Sosna — vicurbestro de Bjalistoko kaj prezidanto de LKK de la 94a UK. Poste ni vizitis

Flormeta ceremonio en la Bjalistokaj Tagoj de Zamenhof (Fotis Andrzej Sochacki)



Unesko: “Esperanto, lingvo justa”

La Zamenhof-jaro, dum kiu oni festos la 150an datrevenon de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto, estis impone inaŭgurita per la konferenco *Esperanto, lingvo justa*, kiu samtempe ligiĝis al la finiĝanta Internacia Jaro de Lingvoj.

Ĝia loko estis la sidejo de Unesko en Parizo kaj ĝi okazis en la Zamenhof-tago — 15 dec 2008. La konferenco estis iniciatita de la pollanda ambasadorino ĉe Unesko, Maria Wodzyńska-Walicka, al kies iniciato aliĝis ŝia litovia koleginino Ina Marčiulionytė. Ili organizis la konferencon kunlabore kun UEA. Ĝi ricevis oficialan karakteron kadre de Unesko, kies Ĝenerala Direktoro Koïchiro Matsuura estis ĝia ĉefa invitanto.

La konferencon prezidis Barbara Despiney, reprezentanto de UEA ĉe Unesko. Ĝi disvolviĝis en du lingvoj, Esperanto kaj la franca, kun samtempa interpretado inter ili. Komence Wodzyńska-Walicka kaj Marčiulionytė bonvenigis la publikon, kiu plenigis la 400-lokan salonon kaj prezentis almenaŭ 12 landojn. Poste Claude Nourmont, vicprezidantino de UEA, legis en Esperanto salutmesaĝojn de prezidanto Probal Dasgupta kaj de la Akademio Internacia de la Sciencoj, senditan de ĝia vicprezidanto Carlo Minnaja. Kiel reprezentanto de la Ĝenerala Direktoro Matsuura, programspecialisto Mauro Rosi el la Sekcio de Kulturaj Esprimoj kaj Kreaĵ Industrioj faris enkondukan paroladon pri la Internacia Jaro de Lingvoj. Li aparte dankis al UEA pro ĝia agado antaŭ unu jaro por tradukiĝi al multaj lingvoj la mesaĝon, per kiu la Ĝenerala Direktoro de Unesko enkondukis la Jaron kaj skizis ĝiajn celojn.

D-ro Louis Zaleski-Zamenhof, la nepo de la kreinto de Esperanto, faris

prelegon pri Ludoviko Zamenhof kiel idealisto, substrekante la aktualecon de liaj idealoj kaj tute aparte tiun de toleremo. Pri Zamenhof kiel lingvisto prelegis Henriette Walter, honora profesoro ĉe la Universitato de Haute Bretagne. Ŝi reliefigis el lingvistika vidpunkto avantaĝojn de Esperanto kompare kun naciaj lingvoj kaj aliaj planlingvoj.

La ne-esperantistaj partoprenantoj povis gustumi la Internacian Lingvon per provleciono el la ĵus lanĉita DVD-disko *Esperanto estas*, post kiu Estelle Maria Loiseau parolis pri la temo “Esperanto en tria jarmilo”, precipe el la junulara vidpunkto. Restis tempo por interesa debato kun demandoj, interalie pri la oficiala instruado de Esperanto kaj ĝia kulturo. Kiel kutimas en Parizo, partoprenantoj povis daŭrigi diskutadon en la halo, ĉirkaŭ honorvino donacita de la pollanda ambasado.

GK UEA

Granda Orkestro de Festa Helpo

Ekde 1993 funkcias en Pollando Granda Orkestro de Festa Helpo. La duan dimanĉon de la jaro, en la tuta Pollando, ĉ. 120 mil volontuloj kolektas sur stratoj monon por subteni kuracadon de infanoj. Okazas koncertoj, piknikoj, aŭkcioj, marŝoj kaj kuradoj. La volontuloj donacas al ĉiu oferanto algluaĵon en la formo de ruĝa koro. Dum tiu eksterordinara tago surstrate oni malofte vidas homon sen la simbolo de la Orkestro. Pasintjare oni kolektis preskaŭ 33 milionojn da zlotoj.

Ĉi-jare, 12 jan oni kolektis monon por subteni kuracadon de infanoj malsanaj je kancero. La dua televidkanalo de la Pola Televido prezentis elektitajn urbojn montrante ion karakterizan aŭ eksterordinaran por la urbo, en kiu

koncertas la Granda Orkestro de Festa Helpo. Tagmeze siajn du televidajn minutojn havis ankaŭ Bjalistoko. Oni prezentis du interesajn temojn: “rosmarojn” (homoj, kiuj naĝas en glacitruoj), kaj esperantistojn, kiuj organizas la 94an Universalan Kongreson de Esperanto kaj festas la 150an naskiĝdatrevenon de Ludoviko Zamenhof.

Elżbieta Karczewska

Kroatio: centjariĝa festo

Bela programo finis la festadon de la centjariĝo de la organizita Esperanto-Movado en Kroatio. En la festa salono de la urba asembleo en Zagrebo 13 dec 2008 renkontiĝis reprezentantoj de 15 kroataj Esperanto-Societoj. La prezidantino de la Asembleo Tatjana Holjevac persone salutis la ĉeestintojn, la urbestro de Zagrebo sendis sian reprezentanton.

La programon, kiun gvidis aktorino Vida Jerman, enkondukis la kroata kaj Esperanta himnoj, kantitaj de operkantisto Neven Mrzleč. Salutparolis vicprezidanto de KEL Radenko Milošević. Josip Pleadin per vortoj kaj bildoj prezentis la riĉan centjaran historion de la Esperanto-Movado en Kroatio.

La krono de la festo estis prezento de la noveldonita *Granda Vortaro Esperanta-Kroata* kun 42 mil vortoj, kompilita de Lucija Borčić. Enkondukon por la plej ampleksa Esperanto-vortaro en Kroatio verkis Nikola Rašić. Pri la vortaro parolis ĝia eldoninto Damir Mikuličić. Neven Kovačić anoncis dum la soleaĵo monpremion *Kalendulo*. La monpremio (mil eŭroj) por la jaro 2008 estis atribuita al Lucija Borčić pro ŝia okjara vortara laboro.

La prezidantino de la urba asembleo de Zagrebo per koktelo regalis la festantojn de la kroata centjariĝo. Ja cent jaroj en historio de la kroata Esperanta Movado estas samtempe jarcento en la historio de Zagrebo.

Ĉi tiu programo estis la tria kaj la lasta parto de la festado de la centjariĝo: maje Kroata Esperanto-Ligo okazigis imponan koncerton por 1500 personoj en urba koncertejo, novembre okazis scienca simpozio pri Esperanto en Filozofia fakultato de Zagrebo.

Spomenska Štímeć



Zagrebo: Per komuna fotado sub la Kristnaska abio sur la placo de Sankta Marko finiĝis la jubilea festado. (Fotis Davor Klobučar)

Du- kaj plurlingva edukado

Konferencon kun tiu ĉi titolo Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) organizis 10 dec 2008 en Bruselo, en la Domo de internaciaj organizoj, kie sian oficejon havas ankaŭ EEU, kun profesiaj tradukinstalaĵoj kaj aliaj servoj. Ĉiu preleganto aŭ diskutanto povis uzi la anglan, la francan, la germanan, la nederlandan aŭ Esperanton, kaj ĉion oni interpretis al la angla kaj la franca.

Partoprenis kvindek da personoj el deko da landoj, duone neesperantistoj, inter kiuj aro da instruistoj kaj reprezentantino de la flandra registaro.

En la malfermo la konferencon salutis du eŭropaj parlamentanoj Ljudmila Novak (Slovenio) kaj Margareta Handzlik (Pollando), kaj reprezentanto de Eŭropa Komisiono Konrad Fuhrman.

La prelegoj estis dividitaj je du partoj: institucia edukado kaj privata hejma edukado. La enkondukan referaĵon faris prof. David Marsh el la universitato de Jyväskylä (Finnlando) “Dulingva edukado en la scisocieto”. Sekvis prelegoj de Marc Demonty “Kelkaj aspektoj de instruado de fremdlingvoj en mezgradaj lernejoj de franclingva Belgio”, de d-ro Seán Ó Riain pri dulingva edukado en Irlando, de prof. Wim Jansen el la universitato de Amsterdamo “Esperanto, nenies forsaltilo, ĉies alsaltloko” kaj de Krystin Tytgat de Erasmushogeschool el Bruselo “20 jaroj de multlingvaj Erasmus interŝanĝoj”. Posttagmeze antaŭ ol ekparoli pri familia edukado, finante la matenan sesion prelegis Angela Tellier pri la eksperimento *Springboard* kaj d-rino Katalin Kováts pri propedeŭtika valoro de Esperanto ĉe hungaraj infanoj.

En la familia parto parolis Jozef Reinvarit pri spertoj de dulingva kaj multlingva edukado en familio de diplomato, Zlatko Tišljari pri Esperanto kiel konscia celo de infanedukado kaj d-rino Katalin Kováts pri eduko de multlingva infano en ŝia familio. Flory Witdoeck parolis pri “Ĉu aĉeti aŭ vendi en la angla”, Michael Cwik pri strategio por Esperanto en edukado, Cwik ankaŭ legis referaĵon de ambasadoro Ulrich Brandenburg pri Esperanto kaj la germana kiel familiaj lingvoj.

Fine oni akceptis konkludojn kaj rekomendojn por la Eŭropa Komisiono.

La konferencon financis EU kadre de subteno de eŭroponivelaj organizoj kiuj aktivis sur la kampo de aktiva eŭropa civitaneco.

Zlatko Tišljari

Laŭ *Eŭropa Bulteno*

La Papo denove salutis Esperante



Je la romkatolika Kristnasko, post sia tradicia Kristnaska mesaĝo en la placo sankta Petro, Papo Benedikto la 16a diris siajn bondezirojn en 64 lingvoj. Post la gvarania lingvo sekvis Esperanto. La Papo diris: “Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron”!

Samkiel dum la antaŭaj benoj “Urbi et Orbi”, Kristnaske kaj Paske, ankaŭ ĉi-foje grupo de esperantistoj ĉeestis en placo sankta Petro por levi alte la panelojn kiuj konsistigis la vorton “Esperanto”. Plurfoje la samtempa televida elsendo tutmonda montris la esperantistojn.

Sed la subtitolado de la itala televido eraris, menciinte la kamboĝan kaj indonezian lingvojn. Nur kiam Benedikto la 16a estis parolanta latine, aperis la subtitolo: “La papo faras la Kristnaskajn bondezirojn en Esperanto”.

Kiel kutime, multaj alproksimiĝis por demandi kio estas “Esperanto”, ankaŭ ĵurnalistoj intervjuis esperantistojn. Ĉar sur la placo homoj, kiuj vidis ankaŭ la panelojn, ripetis: “Esperanto, Esperanto...”, ŝajnis, ke estas esperantista aranĝo...

Laŭ www.ikue.org

Pacpremion de Nobel por UEA!

Ĉar la Rezolucio de la Pollanda Sejmo (= Parlamento) pri kandidatigo de UEA por la Pacpremio de Nobel (Vd. LODE, 2008, №7, p. 5) estis akceptita 12 jun 2008, post la koncerna akceptolimo, ĝi ne povis esti uzita en la Nobel-premiado en 2008.

Kelkaj skeptikaj esperantistoj jam nomis la parlamentan decidon senutila, sed 18 dec 2008 Kazimierz Krzyżak — esperantisto el Gdynia kiu multe helpis pri akceptigo de la somera rezolucio — ricevis jenan mesaĝon de la pollanda vicparlamentestro Jerzy Szmajdziński:

«Estimata sinjoro, mi havas por vi agrablan donacon kristnask-novjaran. Kun plezuro mi povas informi vin, ke la Buroo pri Internaciaj Rilatoj de Pola Sejmo finfine sendis la rezolucion de Pola Sejmo por honori la 100-jaran datrevenon de la fondo de Universala Esperanto-Asocio al la Nobel-Komitato. Mi estas certa, ke vi havas sian ne malgrandan kontribuon por la efika fino de la proceduro. Mi estas plena de admiro al via persisto kaj via engaĝiĝo en la aferon.»

Ĝis la limdato (31 jan 2009) iniciatintoj de la kampanjo klopodas “organizi” kelkajn pliajn kandidatigojn de UEA flanke de individuaj parlamentanoj, registaranoj, profesoroj kaj antaŭaj Nobel-laŭreatoj, inter kiuj eventuale ankaŭ de Lech Wałęsa. Kvankam la jubilea jaro jam estas pasinta, bona preteksto estas ankaŭ la nuna Zamenhofa Jaro.

Interalie, la oficialaj lingvoj agnoskitaj de la Nobel-Komitato estas la angla, la franca, la germana kaj la skandinaviaj lingvoj.

Laŭ ampleksa dosiero sendita de **Eduardo Kozyra**

Vidinte Napolon... seminarii

(**Informitale**) “Vidinte Napolon, vi rajtas forpasi”, — diras itala proverbo, kaj efektive la seminario pri la Internacia Jaro de Lingvoj en Napolo estis tre vidinda.

La temo de la seminario estis: “2008 — Internacia Jaro de Lingvoj” sed oni ne parolis nur pri ĝi, nek pri ĝi parolis la kutimaj parolistoj (Corsetti, Grazzini, kaj tiel plu).

En Napolo ĉeestis ankaŭ neesperantistoj, kiel la prezidanto de la Unesko-klubo kaj la prezidantino de la Universitato de la Tria Aĝo.

Aldoniĝis prelegoj pri parencaj kaj neparencaj temoj: “La lingva situacio en Afriko” de Nino Vessella, “La rolo de la verkisto kaj eldonisto pri disvastigo kaj protektado de la gepatra lingvo” kaj “Nerono en Napolo el la nova libro *Morto de Artisto*” de Anna Löwenstein, kaj kvazaŭ fadeno tra ĉiuj tagoj okazis babiladoj de Nicolino Rossi pri esperantlingvaj poem-verkistoj, aparte pri William Auld.

Neforgeseblaj estis ankaŭ la vesperaj programoj konsistintaj el muziko, deklamado de napolaj poemoj, foje kun tradukoj al Esperanto, kaj amaso da napolaj muziko.

Renato Corsetti

2003-2008: Neimageblaj rezultoj

La 44an Kongreson de la Litova Esperanto-Asocio, kiu okazis 13 dec en Kaŭno, partoprenis 194 personoj: 142 el 27 urb(et)oj de Litovio kaj 52 gastoj el Latvio kaj Pollando.

Post voĉlegado de salutmesaĝoj, pri la agado de la asocio dum la periodo de la nuna Estraro (2003–2008) raportis la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas. Li elstarigis ĉefajn atingojn de la asocio dum ĉi tiu periodo: UK-90, Konferenco de ILEI, Nitobe-Simpozio, blindula kongreso, infankongreseto, du BET-oj (en Birŝtonas kaj Ŝiauliai), Katolika kongreso en Kretinga, scienca konferenco en Kaŭno, ĵurnalista kongreso en Vilno, librofoiroj, 62 eldonitaj libroj, akiritaj ejoj en Vilno, diversa instruado, amasa partopreno en UK-oj kaj en aliaj internaciaj Esperanto-aranĝoj, eldonado de *Litova stelo*, konstanta funkciado de retejo kaj retlisto, prepariĝo por la Zamenhofa solenaĵo en Parizo, konstanta kunlaboro kun amaskomunikiloj...

Jegorovas emfazis, ke ĉi tiu jarkvino estis la plej signifa, la plej komplika, la plej rezultodona, la plej ĝojiga, la plej maltrankvila jarkvino dum la historio de la asocio. La rezultoj, atingitaj dum tiom mallonga tempo, estas simple neimageblaj. Li skizis kelkajn proponitajn ideojn por la estonteco: Internacia Konferenco okaze de la 150-jariĝo de Zamenhof, Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio, Internacia Konferenco pri lingvopolitiko, kunorganizo de la Universala Kongreso en Minsk, transigo de la Centra Oficejo de UEA al Vilno k.s. Estis listigitaj ankaŭ la ĉefaj mankoj kaj problemoj de la asocio.

Sekvis diskutado kaj, fine, elektoj. Kiel prezidanto de LEA por la kvara kvinjara oficperiodo kun du sindetenoj kaj neniuj kontraŭa voĉo estis denove elektita kaŭna advokato Povilas Jegorovas. La unua vicprezidanto iĝis ĵurnalista Audrys Antanaitis el Vilno, vicprezidantoj iĝis prof Aloyzas Gudavičius (Ŝiauliai) kaj Arimantas Račkauškas (Vilno). Kiel respondeca sekretario estis reelektita Irena Alijošiūtė (Vilno). Dek aliaj aktivuloj estis elektitaj kiel estraranoj.

Post la kongreso okazis tradiciaj Zamenhof-Tagoj. Vytautas Ŝilas festprelegis pri “Zamenhof kaj Litovio: kelkaj interesaj momentoj”. Sekvis koncerto de flutistino Lidija Gomolicka-itė-Grudzinskaitė kaj infana flutista ensemblo *Tutti*. Poste ĉiujn tre ĝojigis polaj grupoj: junulara dancgrupo *Baby*



Povilas Jegorovas: la plej sukcesa movad-organizanto (ne nur) en la Orienta Eŭropo.

Jagi kaj Esperanto-teatro *Studio “P”* kun spektaklo *Kvar elementoj*.

Sekvatage sub la gvido de estrarano Zenonas Sabalys oni diskutis aktualaĵojn de la esperantista agado en Litovio. Pri la kongreso kaj pri la Zamenhof-Tagoj vaste informis gazetaro, radioj, televido, retgazetoj, novaj agentejoj k.s.

Povilas Jegorovas

Jarkongreso de PakEsA

La 31a Jarkongreso de Pakistana Esperanto-Asocio (PakEsA) okazis 20–21 dec 2008 en la urbo Multan kun partoprenantoj el Multan, Lahore, Gujranwala, Narowal, Khanewal, Bahawalpur, Rahim Yar Khan, Sialkot, Murree, Lajjah, Lukki Marvat, Bhawalpur, Noshehrah (NWFP) kaj aliaj urboj.

En la komenco Abdul Quddoos Shafqat, ĝenerala sekretario de PakEsA legis versojn el la Nobla Kuraano, tradukis kaj klarigis ilin.

Post sinprezento de la partoprenantoj okazis ĝenerala kunsido de PakEsA. En ĝi reprezentantoj de diversaj urboj raportis pri sia agado. Prezidanto de PakEsA Shabbir Ahmad Sial raportis pri la asocia agado en la jaro 2008.

Estis elektita estraro de PakEsA por la jaroj 2009–2010, kun Shabbir Ahmad Sial kiel prezidanto kaj prof. Rahim Shah Khan kiel ĉefvicprezidanto, pluraj vicprezidantoj kaj Abdul Quddoos Shafqat kiel ĝenerala sekretario. Prezidanto de la junulara asocio PEJO iĝis Irfan Mehdi, redaktoro de *Facila Esperanto* — Tariq Umar Chauhdry.

En aparta kunsido oni decidis pri la labor-plano por la jaro 2009.

Abdul Quddoos Shafqat

Novtipa UEA-ekzameno

Post kelk-jara laboro, je la jarŝanĝo debutis la nova Esperanto-ekzameno, kiu estas konforma al la normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) kaj ofertas egalrangajn mezuradojn de la kvar bazaj lingvaj kapabloj. Partoprenantoj de la Internacia Festivalo en Duseldorfo havis la bonŝancon esti la unuaj por trapasi tiun internacie rekonatan ekzamenon. Ok personoj el ses landoj uzis la eblecon: tri el ili elektis la nivelon B2, kaj kvin kandidatoj aliĝis al la pli supera nivelo C1.

Laŭ la regularo, kontraktita kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) en Budapeŝto, la skribaj taskoj (farendaj en 180 minutoj en B2 kaj en 240 minutoj en C1) estos korektataj tie fare de spertaj fakuloj, kiuj prizorgas la akredititajn samnivelaĵojn ekzamenojn aprobitajn ankaŭ de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE). La buŝajn ekzamenojn en Duseldorfo gvidis Renato Corsetti kaj Zsófia Kóródy.

GK UEA

Pekino: La unua kurso en PEC

Komence de la jaro en la Pekina Esperanto-Centro komenciĝis intensa kurso de Esperanto por grupo da studentoj pri la angla lingvo kaj komputado de Heilongjiang-a Sciencteknika Instituto, kiuj jam eklernis la lingvon en Harbino.

En la unua kurso de PEC, fondita en novembro 2008, plentempe instruas Wen Jingen kaj Wei Shan. La malfermon de la kurso partoprenis ankaŭ Song Ping, profesorino de la angla kaj de Esperanto el la Sciencteknika Instituto, kaj du raportistoj el la Ĉina Radio Internacia (ĈRI), kiu post kelkaj tagoj aŭdigis programeron pri la kurso. Ankaŭ An Dешun, la fondinto de PEC, helpas al la kurso. Li planas dum la proksimaj tri jaroj havigi al Esperantujo 500 junajn esperantistojn.

Song Ping

Sur la suba foto: Fraŭlino Chen Li-na el ĈRI intervjuas studenton Li Ji-ying.



Unua eksterlande, lasta entute?

La unua Ago-Semajno (AS) ekster Pollando okazis inter 27 dec 2008 kaj 4 jan 2009 en Liptovský Mikuláš (Slovakio). Ĉi-foje ĝi iĝis ok-taga, kio ebligis pli buntan programon por pli ol 180 ĉeestintoj el 25 landoj.

La Ago-Semajnon kunorganizis Pola Esperanto-Junularo, *Varsovia Vento*, Slovakia Esperanta Junularo kaj Liptova Esperanto-Klubo. Grave helpis ankaŭ la urbo Liptovský Mikuláš.

AS havis altnivelajn patronojn: vic-ĉefministro de Slovakio Dušan Čaplovič, la urbestro de Liptovský Mikuláš Ján Blcháč, la prezidanto de la distrikto Žilina Juraj Blanár kaj esperantistino Małgorzata Handzlik — pollanda membro de la Eŭropa Parlamento.

Kadre de AS ĉi-foje okazis ankaŭ jam tradicia renkontiĝo de turistoj kaj vojaĝantoj “Poludnica” (vd. apude).

Pri la ĉeftemo: “Lingvoj — pordo al interkulturo” okazis pluraj programeroj. Menciindas ĉefe lingvo-kursoj (Esperanto, slovaka, pola, ukraina, signolingvo...) kaj interesa konkurso — verki sencohavan tekston, rakonton en Esperanto per vortoj, komenciĝantaj ĉiuj je sama litero — ekz. je “e”, “m”, “a”. Pluraj partoprenantoj elpensis vere interesajn artaĵojn (tiuj estos publikigitaj je la hejmpaĝo de AS).

La programo havis plurajn flankojn: prelegoj, kursoj, ekskursoj, koncertoj... Ne eblas menci i ĉiujn interesajn programerojn, do eble nur privata elekto: prelegoj: pri E@I, Granda Moravio, ekologio, kuracaj herboj, revuo *Esperanto*; ekskursoj al la montaro Tatra, al subĉiela muzeo Pribylina kaj hotelo *Esperanto*, montgrimpado al Poludnica; sukcesaj koncertoj de *La Pafklik*, *Georgo Handzlik*, *Dolchamar*, *La Perdita Generacio*, jOmO; ceteraĵoj: seminarieto “Flugiloj de malfacila vento”, Novjara balo, Teatra horo, Mezepokaj dancoj, Kultura kaj Lingva Festivalo — jam tradicia kaj ŝatata okazaĵo dum AS.

AS — malgraŭ ĝia pli longa daŭro ol kutime — pasis ege rapide kaj eblas konstati, ke ankaŭ ege sukcese — en bona humoro, etoso, kun multaj novaj amikecoj kaj planoj por la estonto.

Samtempe kiel la unua eksterlanda AS ĝi estis verŝajne ankaŭ la lasta AS entute — se sukcesos planoj de la organizantoj de kaj AS kaj IS kunigi ilin sub la nomo JES — Junulara E-Semajno.

Legu kaj vidu pli rete: www.as.pej.pl kaj www.lek.szm.sk

Peter Baláž

Neforloginta Poludnica 2009

Dum la unuaj kvar tagoj de la nova jaro jam la 27an fojon renkontiĝis esperantistoj-vojaĝantoj en Slovakio por vintra ascendo de la monto Poludnica.

Unuafoje ĝi estis organizita kadre de la junulara Ago-Semajno. Sed eraris tiuj, kiuj opiniis, ke la amuz- kaj eduk-plena Ago-Semajno forlogos la partoprenantojn de Poludnica. Male, unuafoje en la historio de Poludnica ĝin partoprenis pli multaj eksterlandanoj ol la hejmanoj. La montopinton atingis 46 esperantistoj el 12 landoj, inter ili nur 17 slovakoj.

La partoprenantoj komencis grimpi laŭ la plej kruta pado el civito Iľanovo. Danke al belega vintra vetero kun sunbrilo kaj glacikovrita naturo, la grimpadokazis sen problemoj. Sur antaŭpinto tradicie estis komuna fotado kaj en apuda loko ni konstruis Esperantobon. Ĉi-foje oni suprenportis 42,88 kg da ŝtonoj el diversaj lokoj de Tero.

Unuafoje la plej pezan ŝtonon alportis eksterlandano: Mikaelo Ĵdanov el Jalto (Ukrainio, Krimeo). Inter aliaj interesaj ŝtonoj estis ŝtonoj el la vulkano Etno kaj el la Arkeo de Noa de sub Ararato.

Nun en Esperanto-obo estas 641,90 kg da ŝtonoj. Spontane kreskas nova ZEO. La grimpantoj poste uzante ŝnuregon descendis en la civiton Liptovský Ján, kie vizitis varmakvan basenon kaj saŭnon. Krom sporta programo okazis prelegoj pri diversaj Esperantaj aranĝoj kaj vojaĝekspedicioj en 2008. Antaŭ la grimpadokazis organizita promenado en la Ĵiarska valo, kie esperantistoj vizitis la malnovan mingalerion, simbolan



Esperantistoj sur Poludnica (Fotis Ján Vajs)

montaran tombejon kaj altmontaran kabanon, kie ili praktike travivis transiron de slovaka krono al eŭro.

Al tiuj, kiuj planos partopreni post unu jaro la Junularan E-Semajnon en Zakopane (Pollando), ni anoncas, ke Poludnica okazos 7–10 jan 2010.

Ján Vajs

IS + AS = JES!

[Oficiala komuniko de la Estraroj de PEJ kaj GEJ]

La silvestro de 2009 vidos kunigon de IS kaj AS, du fortaj kaj sukcesaj eventoj, kiuj ĝis nun konkurencis. Ĝi okazos en Zakopane, nomiĝos Junulara E-Semajno kaj gvidos ĝin teamo de kvar spertuloj de ambaŭ pasintaj eventoj: Julia Hell (prezidantino de GEJ), Łukasz Żebrowski (prezidanto de PEJ), Rolf Fantom (estrarano de GEJ por renkontiĝoj), Irek Bobrzak (ĉefo de *Varsovia Vento*).

Dum la aŭtuno de 2008, PEJ- kaj GEJ-estraroj aprobis la planon, kaj en Berlino subskribis kontrakton por klarigi la celojn kaj gravajn punktojn de la projekto. La projekton aprobis la GEJ-jarĉefkunveno dum la IS en Biedenkopf, post detala pridiskuto kaj esploro de la projekto.

Kompreneble nia celo estas kunigi la plej bonajn flankojn de ambaŭ eventoj, fini la dividon inter IS- kaj AS-partoprenantoj, kaj kunigi la fortojn de organizantoj kies fortoj prefere estu uzataj varbi novulojn anstataŭ trakti problemojn kaŭzitaĵojn de konkurenco.

La Internacia Seminario kaj Ago-Semajno pluvivos en la JES, june, kune kaj eĉ pli forte!

Mia unua Internacia Festivalo

Dum jardekoj okazadas en Germanio, dum la jarŝanĝaj tagoj la fama junulara kunveno Internacia Seminario (IS). Sed en decembro 1979 elnaskiĝis plia esperantista kadro por festi la novjarigon: Internacia Festivalo (IF), kiu celis renkontigi aparte la “pli aĝajn junulojn” aŭ la “mezaĝulojn”. De tiam ĝi fariĝis preskaŭ ĉiujara. Ĉi-foje okazis la 25a IF, do kaŭzo por festi jubileon!

Ekde la komenco organizas ĝin la germano Hans-Dieter Platz (HDP). Dank’ al li IF fariĝis unu el la plej gravaj internaciaj kunvenoj de Esperantujo. Multaj esperantistoj, inter ili kelkaj paroj, partoprenas ĝin regule. Ekzemple, la fama paro Claude Nourmont kaj Brian Moon maltrafis neniun IF!

Mi partoprenis la jubilean IF-on kiu okazis 27 dec 2008 – 3 jan 2009 en Duseldorfo, en tre komforta kaj bone ekipita junulara gastejo. Ĝi estis mia unua IF, kvankam mi estas esperantisto de pli ol 40 jaroj. Entute partoprenis ĉirkaŭ 150 personoj el 22 landoj, plejparte el Eŭropo.

Laŭ mia takso la plimulto de la partoprenantoj superas la aĝon 50. Ne multaj estis emeritoj. La etoso estis tre bona, la programo tre riĉa kaj varia kaj la organiziteco — perfekta. Mi povis vidi denove kiel feliĉaj povas esti la membroj de nia internacia “verda familio” kiam ili kunvenas por aŭskulti prelegojn, partopreni laborgrupojn, babili kaj drinki kune en la loka “Knajpo” (drinkejo), kunkanti, partopreni ekskursojn, spekti artajn prezentaĵojn ktp. Kaj la aĝo tute ne gravas!

Dum sep tagoj okazis pli ol 50 dumtagaj prelegoj kaj laborgrupoj. Kelkaj partoprenantoj grumbliis pri tio, ke ili devis cedi pri multaj allogaj prelegoj, ne povante partopreni samtempe du erojn.

Mi menciis etan parton de la titoloj de la prelegoj, nur por demonstri la riĉecon kaj variecon de la temoj: TEJO en 1968; Magia seminarieto kun la magiisto Triksini; Unumonata restado en Nepalo; Lingvistikaj observoj pri kelkaj trajtoj de Esperanto; Teleskopoj: niaj okuloj al la kosmo; Frandu Piron; Interkultura kompreniĝo malgraŭ miskomprenoj; Kiel sukcesplene kongresi dum UK; Paroliga kurso; Rusa Nord-Okcidento per okuloj de franco; Lumbildoj pri Venezuelo; Evoluo de naciaj ideologioj ĉe mez-eŭropaj popoloj; Seminarieto Origamio; Kvizo pri literaturo; Konsilaj de kuracistino: kion kunporti al vojaĝoj; La metabola sindromo; Pupteatra seminarieto;



IF-anoj el Israelo, Japanio kaj Armenio (*Sendis Amri Wandel*)

Vivo kaj verko de la juda poetino Rose Auslander; Juda humuro (mia propra prelegaro...). (Ĉu mi sukcesis konvinki vin, ke okazis abundo da interesaj programeroj?..)

La arta-muzika programo konsistis el la jenaj artistoj: Alejandro Cossavella el Argentino kiu troviĝas en Eŭropo dum kelkaj turne-monatoj, Ĵak Le Puil el Francio, Mikaelo Bronŝtejn el Ruslando. Ĉarma estis ankaŭ la prezento de Armena Vespero far Karine kaj Hasmik Arakelyan kaj Nina Bzhikyan el Armenio.

31 dec okazis la tradicia kisabunda silvestra balo kun ĝiaj ceremonioj pri bonvenigo de la nova jaro laŭ la horzonoj de la diverslandaj partoprenantoj (ni — la du israelanoj — tostis samhore kun gelatvoj, litovinoj kaj bulgarino). Krome okazis Jubilea Vespero kun ŝaŭmvino kaj surprizoj. Aperis antaŭ ni kelkaj IF-anoj, kiuj ĉeestis la unuan IF en 1979.

Okazis ankaŭ tuttaga ekskurso al la famkatedrala urbo Aachen, al la belgia vilaĝo Kelmis, kie antaŭ 100 jaroj fondiĝis la Esperanto-ŝtato Amikejo, kaj al limŝtono inter la tri landoj: Belgio, Nederlando, Germanio.



Sed nenio estas perfekta: Sufiĉe multaj partoprenantoj malvarmumis aŭ malsaniĝis. Imagu: la eŭropa vintro kaj la fermita ne-aerumita ejo... Ankaŭ mi revenis hejmen kun memoraĵo: gripo el Eŭropo.

Resume: eta kaj intima universala kongreso de Esperanto, ege rekomendata al ĉiu esperantisto. Malgrandigu UK-on kaj vi ricevos IF-on, kiu estas same riĉenhava, emocia, instrua kaj plezuriga, sed pli societuma kaj bierabunda...

Koran dankon al vi pro la belaj momentoj, d-ro Zamenhof kaj HDP.

Josef Ŝemer

Dekobla idealo

Dek estas ideala nombro de Oomoto. Verŝajne ne pro hazardo venis al Kameoka ekzakte cent lernemuloj, por partopreni *Transjaran Kurskunvenon de Esperanto*. La japanojn akompanis dek (!) koreoj kaj unu malajo, danke al kiu kompletiĝis la cento.

La transjaraj kursoj estas tradicia aranĝo de Oomoto. Ĉi-foje ĝi daŭris ekde 30 dec 2008 ĝis 2 jan 2009. Ĝiaj partoprenantoj estis ne nur Oomotanoj. La tuta cento estis dividita je sep diversgradaj klasoj kaj pri ili okupiĝis sume dek instruistoj, i.a. Mireille Grosjean (Svislando), kiu gvidis la konversacian grupon, kaj la Cseh-metodisto Atilio Orellana (Nederlando), kiu paroligis la komencantojn. La kurso konfirmis la faman diligentecon de azianoj, nekredoblan por eŭropanoj. Ĉiutage okazis po ses horoj da instruado. Al tio aldoniĝis Kleriga Kurso, kiun konsistigis prelegoj. Krome okazis kunvenoj, ceremonioj kaj malfruhoraj babiladoj en la ejo nomata *Paradizo*. Uf!

Aliflanke oni venis por ĝui la jartransigon. Akompanis ĝin ne brilaj piroteknikaĵoj, sed duonlume celebrata teaceremonio, kies unika etoso ebligis enpeniĝon, meditan rememoron de la forpasanta jaro. La novan jaron 2009 oni frumatene salutis en la impona templo en Kameoka. La Spirita Gvidantino Deguĉi Kurenai troviĝis samtempe en la alia centro de Oomoto, Ajabe, kaj de tie, televidoje, ŝi transdonis sian mesaĝon en perfekta Esperanto. Kiel sciante, la kultura-religia movado Oomoto ekde sia komenco estas estrata fare de virinoj kaj ĝi jam en la 1923a jaro praktike aprobis la internacian lingvon.

Roman Dobrzyński

La fama azia diligentecon ne faras azianojn malridemaj. (*Fotis Roman Dobrzyński*)

Familie kaj mezaĝule

Kun 62 infanoj kaj junuloj ĝis-20-jaraj la sepa Novjara Renkontiĝo de EsperantoLand ankaŭ ĉi-foje estis unu el la plej grandaj familiaj Esperanto-renkontiĝoj. Ĉirkaŭ duono de la infanoj hejme parolas Esperanton, kio bone subtenis la lingvouzadon inter la infanaro. Entute kunvenis en Frankfurto ĉe Majno 143 homoj, tri kvaronoj el eksterlando, el entute 15 landoj — el Kanado, siberia Ruslando kaj el dekduo da eŭropaj landoj. El Argentino venis Alejandro Cossavella, kiu bele koncertis ĉe ni kadre de sia eŭropa turneo. Denove kreiĝis la amikeca etoso de Esperantolando, kion la partoprenantoj tre ŝatis.

En la vespera programo Christoph Frank brile prezentis persone kaj per pupoj teatraĵon pri la aventuroj de Münchhausen, la inventinto de bele fantaziaj rakontoj. Estis luda, muzika kaj internacia vesperoj kaj kompreneble silvestra festo, dum kiu eblis spekti la piroteknikaĵojn de Frankfurto el taŭge lokita salono en la kvina etaĝo.

La infana programo kadre de la temo “la kvar elementoj” enhavis kreadon de kajtoj, raketveturiloj, paraŝutoj, fajropilkaj, kandelaj kaj terornamaĵoj; la junuloj lernis kiel solvi la magian Rubik-kubon kaj spertis surprizan akvarton kaj eksperimentojn pri akvo, aero kaj fajro; estis infana danckurso kaj oni povis lerni akrobatikon. Oni aŭdis “piĵamajn rakontojn” kaj rimaĵojn, kantis komune, ŝminkis unu la alian kaj kreis improvizan muzikan teatraĵon. Grupo de junuloj kreis filmojn pri la aranĝo kaj ofertis daŭran diskotekon al dancemuloj. Okazis luda posttagmezo, dum kiu oni en la unuopaj stacioj solvis diversajn taskojn. Fakte estis plena programo por infanoj kaj junuloj de mateno ĝis vespero kaj malfacilis enui.

La prelegoj temis pri la financa krizo kaj pri gestolingvo, pri Su-Dghok-terapio, Marso, la kvar elementoj en la kosmo, vikipedio, EDE, Esperanto en entreprenoj, Argentino kaj pri Herzberg; estis diskutoj pri “Kio estas esperantisto”, pri perspektivoj por Esperanto kaj pri la Civito. La partoprenantoj povis senstreĉiĝi per gimnastiko, vizaĝmasaĝo aŭ per Yumeiho aŭ ili povis lerni kiel trike (kaj truke) krei bestetojn aŭ hokile triki.

Ankaŭ ĉi-foje estis kursoj por komencantoj, progresantoj kaj konversaciemuloj, kiujn gvidis Katalin Kováts, Sylvain Lelarge kaj Gunter Neue. La ekskursoj kaj promenoj gvidis nin tra



Ne mankis dancoj en Frankfurto: la ĉeforganizanto de NR, Lu Wunsch-Rolshoven, kaj Nancy Fontannaz (Fotis Peter Hauser).

Frankfurto, al muzeo pri la “hirthara Petro” kaj al Darmstadt. Plej grave — malgraŭ ĉiuj unuopaj ofertoj — supozeble ankaŭ ĉi-jare estis la amika babilado, kiu okazis grandparte en nia trinkejo, kiun sperte gvidis Helmut Klünder. La infanoj dume havis sian propran regnon en alia parto de la domo.

La gazetaraj komunikoj atentigis pri la tri samtempaj Esperanto-aranĝoj en Germanio kaj ties impona kresko dum la pasintaj jardekoj; rezulte raportis germana kaj hispana novaĵagentejoj, tri radioprogramoj kaj almenaŭ dek gazetoj kaj retgazetoj el Germanio, Hispanio, Usono, Meksikio kaj Argentino.

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand

VERo en Vieno

Ĝuste 15 dec 2008 okazis en Vieno la unua neformala Viena Esperanto-Rondo (VERo, germane “Esperanto-Stammtisch”) en la Centra Federacio de la Hungaraj Asocioj en Vieno.

La ĉambrego de la Federacio situas bonloke en la centro de Vieno, ĉe Schwedenplatz (Sveda Placo), proksime de la Danuba Kanalo kun bela vido al la ĉirkaŭaĵo. Post salutoj de la prezidanto de la Hungara Centra Federacio kaj de Hans Michael Maitzen, la prezidanto de la Aŭstria Esperanto-Federacio, kaj la estraranino Katalin Fetes-Tosegi, okazis la ĉefa temo de la vespero.

La aparta dato ja elvokis prezentemon pri libroj kaj pro la feliĉa cirkonstanco, ke Petr Chrdle, posedanto de KAVA-PECH, vizitis Vienon, li faris konforman interesan prezentadon. Post tio la bufedo malfermiĝis, kaj babilado

inter la vizitantoj vigliĝis. La estraro de la Aŭstria Esperanto-Federacio ĝojas pro la akcepto de tiu ĉi nova aranĝo kaj esperas, ke multaj bone vizitataj VERoj sekvos kun vigla partopreno de esperantistoj.

Uwe Stecher

FREŜO ‘2009

Frusomera Renkontiĝo de Esperantistoj Ŝatantaj Olŝtinon ‘2009 estos pli interesa kaj pli riĉa ol la pasint-jara.

La fama franca kantisto kaj gitaristo JoMo — Jean Marc Leclercq — prezentos sin antaŭ olŝtina publiko. Kvizanoj povos gajni pli riĉajn premiojn kaj monpremiojn dum ĉiutagaj kvizoj, ĉar gravan monsumon por premioj dediĉis la regionestro s-ro Jacek Protas. Dufoje okazos kutimaj freŝfajroj — ne nur kun kolbasetoj kaj bongustega olŝtina biero (ĉu vi ankoraŭ ne konas ĝin?). Restoracio *Kolorowa* gastigos freŝanojn kiel kutime per (ne)kutima bankedo. Krome: multe da ripozo, ekskursoj, kaj — malmulte da prelegoj...

Sed plej grava informo: prezoj! Imagu, ke unusemajna restado kostos nur ĉ. 60 eŭrojn (noktumado kaj manĝado)... Kaj ne nur ... La pasint-jaraj FREŜO-partoprenintoj ricevos dekprocentan rabaton.

FREŜO ‘2009 okazos en Olsztyn (Pollando) inter la 25a de junio kaj la 1a de julio 2009.

Provu ligi vian kongresan alvenon al Pollando kun ege interesa FREŜO!

Pli detalajn informojn petu ĉe Elżbieta Frenszkowska: ✉ 10-684 Olsztyn, ul. Orłowicza 35 m 5, Pollando, 📧 efrenszkowska@wp.pl.

Unufraze

★ Je 16 jan 2009 al la 94a UK en Bjalistoko aliĝis 1057 personoj el 56 landoj; plej multe el Pollando 200, Francio 175, Germanio 107, Japanio 104, Nederlando 50, Italio 40, Belgio 39, Brazilo 31. (uea.org)

★ Laŭ urba leĝo en la brazila urbo Ubá estas nomita strato “Rua esperantista Edina de Barros Reis”; la malferma ceremonio okazos 31 maj 2009 je la 50-jariĝo de la loka E-Klubo *João Ernesto*. (BEL Informas)

★ 22 dec 2008 en *Programo por Ŝoforoj* de la Pola Radio oni plurfoje atentigis stiristojn en Eo. (PEA)

★ 15 nov 2008 Masaĉuseca E-grupo kun E-sloganoj partoprenis nacian manifestacion kontraŭ la propono malpermesi geĵajn geedziĝojn. (*Usona Esperantisto*)

★ 16 dec 2008 la viena gimnazio en Diefenbachgasse 19 invitis al vintra multkultura festo en la lingvoj germana, pola, serba, turka, araba, itala k Eo; e-istoj kontribuis al la programo per laŭtlegado de poemo de Julio Baghy *Riproĉo* kun traduko en la germana k mallonga informo pri Baghy. (Walter Klag)

★ E-Stando de EAB funkciis en “London Language Show 2008”, okazinta en novembro en la ekspozicia centro *Olympia* en Londono. (EAB Update)

★ En decembro Kataluna E-Fervoja Asocio starigis E-standon en la tradicia Foiro de Kulturaj Asocioj en l’Hospitalitet apud Barcelono. (KAE-Infomilo)

★ Norvega E-Ligo en novembro starigis informbudon en Konferenco pri tutmondiĝo k vendis en ĝi 42 *Ŝlosilojn* k 32 *Ordlister*. (Norvega Esperantisto)

★ Kooperativo de *Literatura Foiro* akceptis la donacon de la proprieto de eta apartamento situanta en Ĉaŭdefono, en la kvartalo Forges. (HeKo)

★ 12-13 dec 2008 en Muzeo de la Imago kaj Sono de Campinas (Brazilo) kadre de la ciklo “Esperanto kaj Kinarto”; estis prezentitaj tri filmoj kun subtekstoj en la portugala lingvo: *Gerda Malaperis*, *La Patro k Esperanto? Respeito em todas as linguas* — kun debato kun la reĝisoro Eduardo Garcês. (kke-diskutlisto)

★ 26 nov ricevis diplomojn 50 anoj de la E-kurso, gvidita de Augusto Casquero ĉe la Altlernejo pri Porprofesiaj kaj Teknikaj Studoj en Foshan; ĉiuj esprimis la deziron plulerni la lingvon. (A.C.)

Ekspozicio de tamtamoj

Ĉi-januale en la poŝtofiĉejo Kamiŝinden en la urbo Maebasxi (gubernio Gunma, Japanio) funkcias ekspozicio de tamtamoj el la mondo. Ĝia organizanto, Hori Jasuo, kolektas muzikilojn danke al Esperanto. Li montras tamtamojn el Japanio, Ĉinio, Nepalo, Mongolio, Barato, Indonezio, Kanado, Kenjo, Peruo, kaj Ekvadoro. Sed ĝis nun li ne povis trovi tamtamon el Eŭropo. Li petas, ke partoprenantoj en la venonta UK el Eŭropo trovu tamtamon en sia lando kaj donacu ĝin al li.



Ĝenerale oni opinias, ke tiaj tamtamoj, nomataj “Denden-daiko” en la japana lingvo, estas infanaj ludiloj, sed en Nepalo, Mongolio kaj Barato ili estas ankaŭ muzikiloj por budhismaj bonzoj. En la supra foto estas granda tamtamo el Nepalo kaj tamtamo kun bela rubando kaj ties sako el Mongolio, kiujn bonzoj uzas dum la legado de sutro.

Japanaj tamtamoj estas ofte faritaj el ligno kaj papero, sed en aliaj landoj oni uzas ledon por la “vizaĝo”. Ĉinoj ŝatas plastajn. En Kenjo oni uzas konkretojn kiel frapilojn. Desegnaĵoj sur la “vizaĝo” estas interesaj. Vi povas vidi zebbron sur la tamtamo el Kenjo kaj tropikan birdon sur tiu el Ekvadoro. Resume, tamtamo reflektas kulturon de sia lando.

Hori Jasuo

Nova prezidanto en Pekino

28 dec 2008 okazis en Pekino la 5a Delegitara Kunveno de la Pekina Esperanto-Asocio kun ĉirkaŭ 50 delegitaj esperantistoj inkluzive de Zhao Jianping, ĝenerala direktoro de la Esperanto-redakcio de la Ĉina Radio Internacia, kaj Yu Tao, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.

Antaŭ ĉio, Zheng Bochong, ĝenerala direktoro de la asocio, raportis pri la disvastigo de Esperanto kaj esplorado de la Esperanto-movado fare de PEA. Poste Wang Yanjing, vicprezidanto de

PEA, faris prikontan raporton de la asocio en la lastaj du jaroj. La laborraporto kaj prikonta raporto estis akceptitaj de delegitoj post ekzamena diskuto. Menciindas, ke Nan Youli elektigis en la kunveno kiel nova prezidanto de PEA. Prezidate de la novelektita prezidanto, delegitoj aktive kontribuis proponojn por aktivigi Esperanton.

ĈRI

Aliĝu al la junulara kongreso!

Jam eblas rete aliĝi al IJK 2009 en Liberec! La unua aliĝperiodo daŭras ĝis 31 jan. Uzu la kutiman retadreson: <http://www.tejo.org/ijk/>

La 65a Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazos 18–25 jul 2009 en la urbo Liberec en Ĉeĥio. “Liberec” rolos ankaŭ kiel kongresa temo — libereco en ĉiuj ties formoj. La kongreson kunorganizas Ĉeĥa, Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj. Liberec situas 100 km norde de Prago, apud la ĉeĥa-germana-pola trilandlimo.

Antaŭe okazos antaŭkongreso en Vieno, trajna karavano el Francio kaj bicikla el Szczecin (Pollando). Poste okazos karavano al la UK en Bjalistoko, kiun sekvos MIRO en Kroatio.

Detalojn pri la kongreso kaj la kongresurbo serĉu en la IJK-retpaĝaro <http://www.tejo.org/ijk/>

LukiZ

Kurado sub la Verda Standardo

Same kiel pasint-jare, la verda standardo de Esperanto kaj T-ĉemizo kun la vorto *Esperanto* estis bone videblaj kaj vidataj de televidantoj kaj de la partoprenantoj kaj spektantoj de la tradicia Silvestra internacia stratkurado en San-Paŭlo (Brazilo).

Nia brazila samideano Walter Fontes denove partoprenis ĉi tiun stratkuradon la 31an de decembro, kaj iuj kurantoj eĉ alparolis lin Esperante aŭ demandis pri la internacia lingvo.

Aloísio Sartorato



Juna esperantisto promociis Esperanton ĉe la Unuiĝintaj Nacioj

de Dafydd ab Iago en Bruselo

Du esperantistoj estis reprezentantoj de UEA en forumo pri malplimulto, organizita 15–16 dec 2008 de la Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo.

Francesco Reale, kiel reprezentanto de UEA, parolis antaŭ grupo de internaciaj gravuloj pri Esperanto kaj ĝia ligo al kultura aŭtonomio kaj socia integriĝo. La alia reprezentanto de UEA, Stefano Keller, parolis pri lingvaj rajtoj kaj pri lingvo-instruado en la mondo.

Francisco Reale bonege eluzis la forumon por klare kaj sendube reklami la internacian lingvon. “La socia integriĝo, kiel la integriĝo de diversaj etnoj, ege dependas de la lingva problemo”, — diris Reale, kiu doktoriĝis en 2005 kiel inĝeniero pri telekomunikado en la universitato de Pizo. En 2006 li translokiĝis al Neuchatel (Svislando) por doktoriĝi ĉe la Federala Politeknika Lernejo de Laŭzano. “La interkompreno estas esenca ilo por alproksimigi popolojn de diversaj etnoj kaj lingvoj. Jen la graveco de komuna lingvo. Sed uzi lingvon de unusola popolo kiel la komunajn lingvon donas grandegajn avantaĝojn al la denaskaj parolantoj de tiu lingvo kaj al tiuj ŝtatoj, al kiuj ili apartenas”, — diris Reale kaj daŭrigis:

“Esperanto estas egaleca solvo. Ĝi estas facile lernebla. Oni atingas bonan nivelon post kelkaj monatoj. Oni pruvis, ke, pro ĝia simpla kaj regula gramatiko, ĝia lernado helpas la regadon de aliaj fremdaj lingvoj. Ni pensas, ke ĝi estas aparte taŭga por la bazlernejoj. Ĝi donas al ili bonan lingvan bazon sen minaci ilian gepatran lingvon”.

“Laŭ diversaj monde konataj spertuloj, Esperanto estas nuntempe unu el la plej bonaj disponeblaj solvoj el la vidpunktoj de la kostoj kaj egaleco, — plu parolis Reale. — Plie, ĝi estas bonega kialo por nin pensigi pri la problemo de la mal-egaleco de internacia komunikado kaj la protektado de la diverseco”.



Foto el Wikimedia

Keller uzis malpli rektan taktikon parolante pri “edukado”. La temo certe ne estas fremda por Keller. Dum 1982–1986 li estis plentempa Esperanto-instruisto ĉe la Kultura Centro Esperantista. Rezulte de siaj universitataj studoj en Budapeŝto, Keller iĝis diplomita instruisto kaj psikopedagogo. “La rajto de infanoj lerni siajn gepatrajn lingvojn kaj daŭrigi sian edukadon en siaj lingvoj, estas grava ne nur por ilia kulturo. Ĝi ankaŭ nepras por ilia psikologia evoluado”, — diris Keller al la UN-forumo.

“La uzado de komuna lingvo evitigas la situaciojn, kie homo, kiu uzas la gepatran lingvon, havas grandegan avantaĝon antaŭ tiuj, kiuj ne povas ĝin (la superregantan lingvon) uzi, — diris Keller. — La granda espero de esperantistoj estas, ke la mondo fariĝos pli paca. Ni pensas, ke efika komunikado ludas ege gravan rolon en la atingado de tiu celo”.

En la fino de la kunveno UEA prezentis proponojn pri amendoj al “Rekomendoj pri malplimulto kaj pri la rajto je edukado”, ankoraŭfoje insistante pri la neceso protekti la lingvajn homajn rajtojn de ĉiuj kaj specife pri la rajto de infanoj lerni pere de sia gepatra lingvo.

Esperanton en lernejojn!

En decembro ruslanda studento en Svedujo, Oleg Izjumenko, verkis ĉe usona retpaĝaro “change.org” proponon, kiu celis enkondukon de Esperanto ĉe usonaj lernejoj. La paĝaron faris aktivuloj kiuj volis organizi voĉdonadon por eltrovi mallongan liston da ideoj por proponi al la nova prezidento Barack Obama — kaj, samtempe, allogi registriĝojn al sia propra retpaĝaro. La voĉdonado okazis en du etapoj: en la unua, la dek plej altaj el ĉiu kategorio gajnis. En la dua etapo nur dek gajnis. La propono pri Esperanto kun 2172 voĉoj sukcesis en la unua etapo okupi la duan lokon en la sekcio *Edukado*, sed ĝi ne estis inter la dek gajnintoj ĉe la fino.

La propono ricevis 3597 voĉdonojn. Ĝi estas la 25a inter la proponoj kaj ricevis specialan mencion ĉe la retpaĝaro.

La tri gajnintoj estas:

1. Leĝigi la kuracajn kaj distrajn uzojn de kanabo (19.530 voĉoj)



2. Starigi postenon de Ŝtata Sekretario pri Paco kaj Departementon pri Paco kaj Neperforto (14.994 voĉoj)

3. Konstrui verdan (ekologian) elektrotreton dum 10 jaroj (12.913 voĉoj)

La esperantistoj faris fervoran, intensan laboron por altigi la nombron da voĉdonoj. Per anoncoj kaj petoj ĉe retpaĝaroj kaj epostaĵ listoj, ili dissemis la ideon kaj sendis klarigajn mesaĝojn diverslingve pri kiel registri kaj voĉdoni por tiuj, kiuj ne parolas la anglan. Oni metis anoncojn kaj ligilojn ĉe multaj

retpaĝaroj kaj interretaj grupoj. UEA organizis eĉ la delegitan reton por anonci kaj diskonigi la konkurson.

En 1954 okazis simila intensa laboro dum tuta jaro por akiri preskaŭ 900 mil subskribojn por subteni peticion al Unuiĝintaj Nacioj. Tiu strebo ne sukcesis akiri rekonon de la UN mem, sed finfine kondukis al la sukcesa rezolucio ĉe Unesko en Montevideo favore al Esperanto, unu el la plej grandaj sukcesoj de ekstermovada rekono de Esperanto.

Post la anonco de la rezulto, Izjumenko klarigis: “Al mi tio ŝajnas kiel esprimo de subteno de alianco de neregistaraj organizoj kunlaborantaj kadre de Change. Ĉu eble niaj amikoj en Esperanto-USA baldaŭ havos novaĵojn por ni? Post tio oni povas esti tutcerta ke — jes, ni ja povas!”

Izjumenko kaj liaj kolegoj nun celas aktivigi la subtenintojn kaj invitas kunlabori ĉe la esperanto-por-obama grupo ĉe groups.google.com.

Steven D. Brewer

Jaro 2008: Niaj atingoj kaj fiaskoj

Tuj post la finredakto de la januara *Ondo* ni ricevis ankoraŭ unu respondon al la demando “Kiujn Esperanto-eventojn vi taksas la plej pozitiva(j) kaj la plej negativa(j).”



Humphrey Tonkin
Usono
Eksprezidanto de UEA

Plej pozitivaj eventoj: Mi dubas ĉu la Kataluna Esperanto-Kongreso faris grandajn ondojn en la movado, sed ĝi estis bela ekzemplo de tio, kion oni povas fari je la loka kaj regiona nivelo por konsciigi nian Esperanto-socion pri la grandaj demandoj, kiuj akompanas la lingvan demandon. Pro iom samaj kialoj mi estis impresita de la Tut-Amerika Kongreso en Montrealo. Tiun vervon mi ne renkontis en la UK en Roterdamo, kie mi havis la impreson, ke iel la organizantoj mistaksis la bezonojn kaj atendojn de la partoprenantoj. La UKoj restas iom tro ŝablonaj.

Plej negativaj: La ŝajna nekapablo de la gvidaj organoj de nia movado kompreni, ke la mondo de neregistaraj organizaĵoj kiel la nia — t.e. volontulaj organizaĵoj kun specifaj celoj — profunde ŝanĝiĝis, kaj ke la novaj metodoj, kiuj aperas jen kaj jen en la movado, ne estas konkurencaj aŭ malamikaj, sed enkalkulindaj en formiĝo de nova strategio. Por preni ekzemplon el mia propra lando — UEA riskas fariĝi la *General Motors* de la Esperanto-movado.

Informi kursanojn kaj grupanojn

Ĝis nun mi legis ĉiujn ekzemplerojn de *La Ondo de Esperanto* kaj aŭskultis ĉiujn viajn ĝisnunajn podkastojn. Mi faras tion pro mia scivolo, por mia edifo kaj por la profito de miaj kursanoj, ĉar nur bone informita instruisto povas bone informi siajn grupmembrojn. Komprenoble mi ĉiam montras la ekzemplerojn de *La Ondo de Esperanto* al ili kaj poste pludonas la ekzemplerojn al ili.

Kaj mi havas proponon:

En *La Ondo* 2009/01 plurfoje estas menciita la mallongigo GK. Mi tute ne scias, kion ĝi signifas. Ankaŭ PIV ne mencias ĝin en sia listo de mallongigoj. Ĉu vi do povas aldoni je la fino de la gazeto indksojn kun la mallongigoj uzataj en tiu eldono komprenoble kun la signifoj? Vi ŝparos spacon por tio, ĉar en tiu kazo vi ne devas mencii la signifojn ene de la tekstoj!

Krome mi havas novaĵon por vi. Sur paĝo 19 de 2009/01 vi demandis: “Ĉu iu esperantologo kompilos finfine nom- kaj tem-indksojn (de *La Esperantisto*)?” Mia Esperanto-amiko Franz Zeller el Aalen, suda Germanujo, jam kompilis tiujn indksojn.

Josef Schiffer

Ni dankas nian germanan abonanton kaj aŭskultanton pro la diskonigo de *La Ondo* kaj invitas niajn legantojn sekvi lian ekzemplon kaj pli kuraĝe diskonigi *La Ondon* en kluboj, kursoj kaj renkontiĝoj.

En la venonta kajero ni aperigos la liston de la mallongigoj. Se temas pri la indksoj de *La Esperantisto*, ankaŭ konata interlingvisto, kiu preferas resti anonima, sciigis nin ke li havas tiujn, sed ne deziras publikigi ilin.

LODE

La Esperantisto de la Jaro 2008

En la komisiono pri elektado de la Esperantisto de la Jaro partoprenas pli ol tridek reprezentantoj de diversaj tendencoj en la esperantista komunumo.

Proponantoj

Marija Beloŝević (Kroatio): ekssekretario de ILEI

Viŝnja Branković (Italio): direktoro de *Orbis Pictus*

Renato Corsetti (Italio): prezidanto de IEF

Aida Čižikaitė (Litovio): estrarano de ILEI

István Ertl (Luksemburgio): tradukisto ĉe Eŭropa Revizora Kortumo

Judit Felszeghy (Hungario): ekssekretario de la Esperanta PEN-Centro

Edmund Grimley Evans (Britio): eksprezidanto de EAB

Maritza Gutiérrez González (Kubo): estro de la Esperanto-redakcio de Radio Havano

Hori Yasuo (Japanio): eksprezidanto de KAEM

Dafydd ab Iago (Belgio): eksdirektoro de la Brusela Komunikadcentro de EEU

Aleksander Korĵenkov (Ruslando): redaktoro de *La Ondo de Esperanto*

Lee Jung-kee (Koreio): prezidanto de KAEM, direktoro de Seula Esperanto-Kulturcentro

Vinko Markovo (Francio): plenumkomitatano de SAT, redaktoro de *La SAGO*

Bruno Masala (Francio): komitatano de IKUE

Valentin Melnikov (Ruslando): poeto, ĵurnalista, tradukanto

Barbara Pietrzak (Pollando): kunlaboranto de la Esperanto-redakcio de la Pola Radio

Yamasaki Seikō (Japanio): membro de la Akademio de Esperanto

Ziko van Dijk (Germanio/Nederlando): historiisto, aŭtoro de *Die neutrale Sprache*

Elektantoj

Petr Chrdle (Ĉeĥio): direktoro de KAVA-PECH

Madeleine de Zilah (Francio): kunredaktisto de *La Gazeto*

Michel Duc Goninaz (Francio): lingvisto, redaktoro de NPIV

Agneta Emanuelsson (Svedio): estrarano de FEM

Gbeglo Koffi (Togolando): administranto de la Afrika Centro Esperantista

Ilona Koutny (Pollando): gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM

Liu Haitao (Ĉinio): interlingvisto

Stano Marček (Slovakio): redaktoro de *Esperanto*

Geraldo Mattos (Brazilo): eksprezidanto de la Akademio de Esperanto

Stefan Maul (Germanio): ĉefredaktoro de *Monato*

Atilio Orellana Rojas (Nederlando/Argentino): direktoro de IEI, sekretario de ILEI

Sergio Pokrovskij (Ruslando): sciencisto, tradukanto, eseisto

Anna Ritamäki-Sjöstrand (Finnlando): eksprezidanto de EAF

Roland Rotsaert (Belgio): kasisto de IKEF; redaktoro de *La Merkato*

Josef Šemer (Israelo): prezidanto de ELI

Ljubomir Trifončovski (Bulgario): verkisto, redaktoro

Sekretario

Halina Gorecka (Ruslando): eldonanto de *La Ondo de Esperanto*

Apogo al ses bibliotekoj

Ses bibliotekoj ricevis subvenciojn de Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen je la suma valoro de 1250 eŭroj. La subvencioj estas donataj kiel libroj. Per decido de la estrarano de UEA pri kulturo Claude Nourmont kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller estis subvenciitaj la librokolektoj de Srilanka Esperanto-Asocio, Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (Kroatio), Centro Internacia de Esperanto (Madagaskaro), Esperanto-klubo de Jelec (Ruslando), Triesta Esperanto-Asocio (Italio), kaj Esperanto-Biblioteko de Limoĝio kaj Okcitanio (Francio).

Subvencioj de la Biblioteka Apogo estas disdonataj ĉiujare ekde 1997. Petoj pri subvencioj en 2009 devos atingi la Centran Oficejon ĝis 15 okt 2009. Kun la peto oni sendu liston de dezirataj libroj, kiuj estu ordigitaj laŭ dezirindeco.

GK UEA

La 13an de decembro 2008 mortis en Hago

Stephan Lang (1945–2008)

nederlanda aŭtoro, konata al la Esperanta publiko pro la romano *La talpoĉasisto*, kiun li verve prezentis en la Roterdama UK.

22 dec 2008 pro kormalsano en Vilno forpasis

Stasys Gaidamavičius (1947–2008)

inĝeniero, poste konstruisto, aŭtoro de litovlingvaj libroj pri masonado kaj hejma mastrumado. Esperantisto ekde 1969, li aktivis en la vilna E-klubo *Juneco* kaj en SEJM (interalie, kiel estro de la magnetofona servo), organizis renkontiĝojn, verkis artikolojn litove kaj Esperante, multoblogis Esperanto-eldonaĵojn. Redaktoro de *Kurte*, aŭtoro de *100 demandoj kaj respondoj pri Esperanto* (1977, 1979) kaj de *Litovaj-Esperantaj konversacioj* (1994, 2003).

29 dec en vilaĝo Bienno pro incendio mortis

civitano Ermanno Mello (1942–2008)

uzinisto kaj komercisto, proleta publicisto. Esperantisto ekde 1959, li aktivis kiel marksisto-leninisto, verkis ideologie inspiritajn poemojn en Esperanto, kaj iĝis la plej konata maŭisto en la itala Esperantio.

3 jan 2009 forpasis en Brazilo

Délio Pereira de Souza (1918–2009)

aktiva esperantisto dum preskaŭ tuta sia vivo, kunfondinto de E-Asocio en Rio-de-Ĵanejro kaj de Spirita Eldona Societo Lorenz, aŭtoro de *Brazilaj geografiaj nomoj* (1981) kaj *Homaranismo: A idéia interna* (1983).

9 jan 2009 en Dimitrovgrad pro koratako forpasis

d-ro Vladimir Ju. Sĉotkin (1942–2009)

talenta scienculo, ellaborinto de la efika vakcintipa preparaĵo kontraŭ leŝmaniozo, lerta lignometiisto; fidela esperantisto, kiu dum pli ol 25 jaroj grave kontribuis al la Esperantomovado en Centra Azio. Lastatempe li loĝis en Ruslando kaj okupiĝis pri esperantigo de literaturaj verkoj.

14 jan 2009 en Chietti pro pulma kancero forpasis

Giorgio Bronzetti (1933–2009)

direktoro de poŝta oficejo, esperantisto ekde 1949, prezidanto de la itala sekcio de TEJO en la 1950aj jaroj, zorganto pri la evoluo de la Esperanto-grupoj en la regiono Abruco, fondinto de la lingvodefenda asocio *Allareme Lingua*, membro de la konsilantaro de Itala Esperanto-Federacio, prizorganto de la gazetara servo *Disvastigo*.

Ni funebras kaj kondolencas.



E@I prezentas

Filmo Esperanto estas...

La projekto pri la filmo *Esperanto estas...* havas longan historion. Ĝi komenciĝis jam en la jaro 2005, kiam eklaboris rete tri ĉefaj “kulpuloj” pri la ideo por la filmo: Hokan Lundberg el Svedio, Roĝener Pavinski el Brazilo kaj Peter Baláž el Slovakio. Ĝis la jaro 2008 estis konstante kolektata materialo, filmataj scenoj, kreaĵoj novaj partoj de la filmo. La filmo (krom ebleco spekti ĝin rete en malalta kvalito) finfine aperis novembre ankaŭ en DVD-formo.

Temas pri informfilmo pri Esperanto, kiu dum 43 minutoj en ses partoj celas montri, ke Esperanto estas viva, uzata kaj tre ŝatata lingvo de multaj homoj.

Unuopaj ses partoj estas spektablaj/montreblaj ankaŭ tute aparte, ĉiu el ili traktas Esperanton kaj la E-movadon per iom alia maniero, prezentas aliajn flankojn de ĝi.

La filmo origine ekestis en Esperanto, sekve aldoniĝis aliaj lingvoj — kaj pro la troa multlingveco de ĝi devis esti presitaj DVDj en 2 versioj — dividitaj laŭ la lingvoj, en kiuj ĝi aperas (entute kun 10 voĉoj/dublado kaj aldonaj 29 subtekstoj). Ĝis nun esperantistoj mendis pli ol 3000 diskojn. La prezo de la disko estas simbola, celanta ĝian plejeble vastan disvastigadon: 3 EUR/peco ĉe mendo ekde 25 ĝis 99 DVDj, 2 EUR/peco ĉe mendo de 100 kaj pli da DVDj.

La espero estas, ke la filmo informos milojn da homoj pri la taŭgeco de Esperanto por internacia komunikado, kaj ke la filmo donos tiom bonan impreson, ke multaj ankaŭ volos eklerni la lingvon. Efektive jam pluraj landaj televidoj transprenis partojn de la filmo por raportoj pri Esperanto. La frapfrazo de la filmo estas: “Esperanto estas... lingvo lerninda!”

Finance subtenis la realigon de la filmo ESF kaj Ido-fondaĵo. La presadon de la diskoj helpis *Slezák grupo* el Hungario kaj Steve Cobb el Usono.

Pli da detaloj pri la filmo (ankaŭ kun ebleco mendi ĝin) troveblas ĉe: www.esperantodvd.net. Unuopaj ĉapitroj de la filmo spekteblas ankaŭ rete: www.esperantoestas.net kaj/aŭ <http://esperantoestas.blogspot.com/>

Interesa pri la realigo de la projekto mem estas ankaŭ la fakto, ke la kerna teamo (do la tri ĉefaj personoj) neniam renkontiĝis vive — la tuta kunlaboro funkciis pere de interreto (same validis por multlingvigo de la filmo, interŝanĝo de konsiloj kun aliaj helpantoj...). Ankaŭ tio klare demonstras, kiel forta kaj potenca estas ebleco de novaj teknologioj por nia movado.

Peter Baláž

E@I-kunordiganto, kunkreinto de la filmo





Aktualaj problemoj de zamenhofologio

de Aleksander Korĵenkov

Ĉi tiu teksto estis unue prezentita kiel festprelego en la Zamenhofa Tago en Kaŭno (Litovio) en decembro 2007 kaj poste en la simpozio “Lingvistikaj kaj kulturaj aspektoj de interlingvistiko” en Poznań (Pollando) en septembro 2008. La aŭtoro dankas al Reinhard Hauptenthal, Andreas Künzli, Ulrich Lins, Walter Ŝelazny, kiuj tralegis la tekston antaŭ la publikigo kaj donis valorajn konsilojn.

La proksimiĝanta 150-jariĝo de Zamenhof estas bona okazo por vidi la nunan staton kaj skizi la proksimajn taskojn de zamenhofologio. Per “zamenhofologio” mi celas tiun interdisciplinan sciofakon, kiu esploras, sistemigas kaj popularigas la vivon, la kreadon kaj la ideojn de Ludoviko Zamenhof, simile al, ekzemple, ŝekspirologio kaj puŝkinologio, kiuj esploras la kompleksajn demandojn respektive pri Ŝekspiro kaj Puŝkin. Esence temas pri kvar ĉefaj objektoj de zamenhofologio: la vivo, la verkoj, la lingva kreado kaj la ideologio de Zamenhof.

Kompreneble, ĉi tiuj objektoj interdependas kaj interplektiĝas, sed tiu demarkacio estas oportuna metodologie.

LA VIVO

La vivon de Zamenhof ni konas laŭ artikoloj kaj libroj. La plej legata inter ili plu restas la *Vivo de Zamenhof*¹ de Edmond Privat, eldonita antaŭ 88 jaroj. Facile legebla kaj emociveka, ĝi estis plurfoje reeldonita.

Kvankam Privat dum sia vivo en reeldonoj povintus kompletigi sian biografian romaneton, li ne faris tion, kaj en 2007 ĉe UEA aperis la sesa eldono de la Privata teksto² (feliĉe, kun aŭtentigitaj citaĵoj kaj kun komentoj de Ulrich Lins). Realajn faktojn pri la “Majstro” oni prefere ĉerpu ne en la verketo de Privat, kaj ne el la verkoj de Marjorie Boulton³, Roman Dobrzyński⁴, kaj de René Centassi kaj Henri Masson⁵, sed el pli dokumentitaj libroj. La plej fidinda el ili estas eble la *Senlegenda biografio de L.L. Zamenhof* de Itô Kanzi (= Ludovikito)⁶.

Multaj informoj pri Zamenhof estas ankaŭ en *Doktoro kaj lingvo Esperanto* de Adolf Holzhaus⁷, *Halina dokumento pri la studentaj jaroj de L.L. Zamenhof*⁸, *La kaŝita vivo de Zamenhof* de Maimon⁹, *La familio Zamenhof* de Zofia Banet-Fornalowa¹⁰, *1887 kaj la sekvo* de Gaston Waringhien¹¹, *Memorlibro pri la Zamenhof-jaro*¹² kaj en pluraj volumoj eldonitaj de Ludovikito kadre de PVZ (vd. en *Verkoj*). Valoraj artikoloj aperis en gazetoj kaj en libroformaj kolektoj, ekzemple, de Ryszard Kraŝko¹³ kaj de Walter Ŝelazny¹⁴.

Okaze de la jubilea jaro 2009 estas verkataj almenaŭ tri biografioj de Zamenhof: Andreas Künzli verkas germane (la 150-paĝa teksto jam estas preta). Walter Ŝelazny verkas pole, kaj la aŭtoro de ĉi tiuj linioj verkas en Esperanto. Espereble, unu el ili poste aperos ankaŭ en la angla lingvo kaj en aliaj mondlingvoj.

La verkadon de biografioj komplikas nesufiĉa fakta materialo. Oni scias nur malmulte, ekzemple, pri la agado de Marko Zamenhof, pri la familioj de la patrino kaj edzino de Ludoviko, pri la restado de Ludoviko Zamenhof en Płosk, Ĥerson kaj Grodno, pri neesperantistaj konatoj kaj parencoj de Zamenhof, pri lia aktivado en Ĥibat Cion, pri la manuskripta bruligo, ktp.

La aŭtoroj devas pli kritike distingi inter faktoj kaj rememoroj. Oni scias, ekzemple, pri eraroj (ne gravas: intencaj aŭ senintencaj) en la rememoroj de kelkaj liaj samtempuloj, aperintaj dise en la gazetaro, kaj reeldonitaj de Ludovikito¹⁵ (temas, interalie, pri la rememoroj de Devjatnin kaj Poŝka). Zamenhof mem donis kontraŭdirajn informojn pri kelkaj eventoj de sia vivo en la publika letero

al Borovko kaj en siaj leteroj privataj, ekzemple, al Michaux kaj al Javal, kaj en la intervjuo en *Jewish Chronicle* (ĉiuj represitaj en *Mi estas homo*¹⁶ = MEH).

Prefere oni kredis dokumentojn, kvankam eĉ en la kolekto de Halina Edelbaum enestas eraroj, ĉar ĝi enhavas retajpitajn tekstojn, ne faksimilojn de la originaloj. La ludovikita volumo *Aŭtografaj de Ludoviko*¹⁷ ne estas kompleta, kaj zamenhofologoj havas la taskon kompletigi ĝin aŭ almenaŭ kompili indekson kun la indikoj pri lokoj, kie estas konsulteblaj la originalaj dokumentoj de/pri Zamenhof (aŭ iliaj faksimiloj) ne publikigitaj en la *Aŭtografaj de Ludoviko*.

Estas klare, ke arkivan esplorado, scienca dokumentado kaj verkado de biografio apenaŭ povas fari unu sama homo. Jam estas kelkaj aŭtoroj, kiuj preta verki pri Zamenhof, sed dume mankas entuziasma, laborkapabla kaj kompetenta persono, kiu dediĉus sin al esplorado de dokumentoj en Bjalistoko, Varsovio, Moskvo, Peterburgo, Grodno, Jerusalemo, kaj kiu trarigardus tiutempan gazetaron en la lingvoj rusa, pola, jida kaj hebrea.

Krom nova biografio devos esti eldonita ankaŭ enciklopedio Zamenhofa kun bazaj informoj pri li, pri liaj verkoj, pri personoj kun kiuj li havis kontaktojn, pri urboj en kiuj li loĝis k.t.p. Sed dume neniu persono aŭ instanco akceptis ĉi tiun defian taskon.

LA VERKOJ

Dum la vivo de Zamenhof liaj verkoj aperis libroforme kaj en gazetaro, aŭ restis manuskriptaj (leteroj). Post lia forpaso oni komencis kolekti, editori kaj

eldoni ilin. La unua posteuma kolekto, editorita de Johannes Dietterle¹⁸, aperis en 1929, dek du jarojn post la forpaso de Zamenhof. En 1948 sekvis duvoluma kolekto de leteroj de Zamenhof¹⁹, kolektitaj kaj kompetente komentitaj de Gaston Waringhien. Multaj Zamenhofaj leteroj estas ankaŭ en la kolekto de Adolf Holzhaus²⁰, eldonita en 1975. Krome, pluraj tekstoj de Zamenhof intertempe aperis dise en aliaj libroj kaj en gazetaro.

Ili ĉiuj kaj multaj aliaj tekstoj estis reeldonitaj de Ludovikito, kadre de *Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof*²¹, kiu konsistis el tri partoj: originalaĵoj (16 volumoj), tradukoj (7 volumoj) kaj kromkajeroj (10 volumoj, inkluzive de la jam menciitaj *Senlegenda biografio*, *Ludovikologiaj biografietoj* kaj *Aŭtografoj de Ludoviko*). Poste la originalaĵoj estis represitaj en la tri volumoj de *Iom reviziita plena verkaro*²² kaj la projekton kronis 21 volumoj de *Ludovikologia dokumentaro*²³ kun pluraj “inkunabloj”. En la 57 volumoj de tiu kolekto, kutime nomata PVZ, estas ne nur originalaj verkoj, studoj kaj leteroj de Zamenhof, sed ankaŭ liaj tradukoj, leteroj al li, rememoroj, tiutempaj gazetartikoloj, inkunabloj de Esperanto, jarkolektoj de *L'Espérantiste* kaj *Lingvo Internacia* kaj alia materialo. La tuton kompletigas *Pri nia pvz-ado*²⁴, kiu iusence estas la 58a volumo de PVZ.

En ĉi tiu bona tekstaro, bedaŭrinde, mankas sistema tekstologia prilaboro, unuecaj komentoj kaj notoj. Mi ĵus uzis la epitetojn “entuziasma, laborkapabla kaj kompetenta”. Ja entuziasma estis Ludovikito, ankaŭ laborkapabla kaj laborema, sed ne ĉiam kompetenta, kaj malgraŭ helpo de Waringhien kaj Hauthenthal, kiun li ĝuis, oni ricevas la impreson, ke li malmulte konis la tradicion de editorado de plenaj verkaroj de verkistoj kaj filozofoj en Eŭropo.

En la gazetaro de tempo al tempo aperas pli frue ne konitaj verketoj (plejparte, leteroj) de Zamenhof. Ili aperos ankaŭ poste, ja oni ĝis nun ne retrovis, ekzemple, la originalon de “*Al altar' de libereco, fratoj nun rapidu...*”. Tiujn “novajn” verkojn oni devas kolekti kaj eldoni suplemente al PVZ.

Krome estus oportune havi ankaŭ laŭteme ordigitajn verkarojn Zamenhofajn: lingvan, primovadan, ideologian kun akcesoraj tekstoj klarigaj. (Ekzemple, ĉe represo de *Esenco kaj estonteco...* estus celtrafe suplementi la eseon de Marc Bavant, kiun li verkis en 2007

kiel taskon en la kurso “Historio de Esperanto” ĉe la universitato Adam Mickiewicz en Poznań.)

La beletraj tradukoj de Zamenhof plurfoje aperis, sed estas bezonata filologia eldono, kun bona enkonduko, kun komentoj pri la originaloj, pri la historia fono, kun notoj pri la frazoj kaj vortoj, kiujn Zamenhof erare tradukis, kun komparoj al tradukoj de aliaj tradukintoj.

Alia grava tasko de zamenhofologio

estas nacilingva prezentado de la plej gravaj verkoj de Zamenhof, almenaŭ en la angla lingvo, ĉar ne estas eble interesi la mondon pri Zamenhof, se oni povas legi liajn verkojn nur en Esperanto. Sed pri tio temos sekvafoje.

Fine, estas apenaŭ kredeble kaj preskaŭ skandale, ke ĝis nun ne estas eldonita scienca bibliografio de la verkoj de Zamenhof kaj de la zamenhofologiaj verkoj.

Daŭrigota

REFERENCOJ

1. Privat E. *Vivo de Zamenhof*. London: Brita Esperanto-Asocio, 1920.
2. Privat E. *Vivo de Zamenhof* / Red., enkonduko. U. Lins. 6a eld. Rotterdam: UEA, 2007.
3. Boulton M. *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto*. La Laguna: J. Régulo, 1962.
4. Dobrzyński R. *La Zamenhof-strato*. Verkita laŭ interparoloj kun d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof. Kaunas: Ryto varpas, 2003.
5. Centassi R., Masson H. *La homo, kiu defiis Babelon* / Trad. el la fr. G. Lagrange, P. Combet. Paris: L'Harmattan, 2001.
6. [Itô Kanzi]. *Senlegenda biografio de L.L. Zamenhof*. Kioto: Ludovikito, 1982.
7. Holzhaus A. *Doktoro kaj lingvo Esperanto*. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1969.
8. Edelbaum H. *Halina dokumento pri la studentaj jaroj de L.L. Zamenhof*. Tokio: Ĵuntaro Iŭaŝita, 1977.
9. Maimon N.Z. *La kaŝita vivo de Zamenhof*. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1978.
10. Banet-Fornalowa Z. *La familio Zamenhof*. La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 2000.
11. Waringhien G. *1887 kaj la sekvo...* Eseoj IV. Antverpeno; La Laguna, 1980.
12. *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro* / Red. I. Lapenna. Londono: CED, 1960.
13. Kraško R. *Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto* / Trad. el la pola A. Zieliński // Kraško R. Zamenhof; Lejk J. Movado; Źelazny W. Doktrino. Varsovio: Esplorleriga Centro de PEA, 1983. P. 11–43.
14. Źelazny W. *Tezoj pri la esploraj postuloj pri la Zamenhofa verko kaj vivo kaj ties influo en la Esperanto-movadon* // Strategiaj demandoj de la Esperantokomunumo. Varsovio: PEA, 1985. P. 138–144.
15. *Ludovikologiaj biografietoj* / [Komp. Itô Kanzi]. Kioto: Ludovikito, 1987.
16. Zamenhof L. *Mi estas homo* / Komp., koment. A. Korĵenkov. Kaliningrado: Sezonoj, 2006.
17. *Aŭtografoj de Ludoviko* / [Komp. Itô Kanzi]. Kioto: Ludovikito, 1989.
18. Zamenhof L. *Originala verkaro* / Komp. J. Dietterle. Leipzig: Ferdinand Hirt & Sohn, 1929.
19. [Zamenhof L.] *Leteroj de L.-L. Zamenhof. La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj*. 2 vol. / Komp., koment. G. Waringhien. Paris: SAT, 1948.
20. Zamenhof L. *Leteroj* / Komp. A. Holzhaus. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1975.
21. *Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof*. 33 vol. / [Komp. Itô Kanzi]. Kioto: Ludovikito, 1973–1992.
22. [Zamenhof L.] *Iom reviziita plena verkaro de L.L. Zamenhof*: Originalaro. 3 vol. / [Komp. Itô Kanzi]. Kioto: Ludovikito, 1989–1991.
23. *Ludovikologia dokumentaro*. 21 vol. / [Komp. Itô Kanzi]. Kioto: Ludovikito, 1991–2004.
24. [Itô Kanzi]. *Pri nia pvz-ado*. 1959–2004. Kioto: Ludovikito, 2004.

Ĉu vi kaj via klubo prepariĝas al la 15a de decembro 2009?

“La Ondo” jubileas

Nur en 1904, dek ses jarojn post la malsukcesa provo de Zamenhof fondi Esperanto-periodaĵon en Ruslando, estis ricevita permeso eldoni esperantistan gazeton. La gazeton *Esperanto* fondis en Peterburgo Ilja Ostrovskij (Jalta), kiu redaktis ĝin kun la asisto de la prezidanto de la peterburga societo *Espero* Aleksandr Asnes.

Post tri kajeroj la gazeto ĉesis, ĉar Asnes akceptis la redaktoran oficon en *Ruslanda Esperantisto*, la organo de *Espero*, kiu eldonis ĝin dum tri jaroj. En 1908 post eldono de unu numero de *Ruslanda Esperantisto*, ĝi ekpaŭzis, ĉar Asnes konvinkis la eldonanton de la populara revuo *Vestnik Znanija* (Heroldo de Scio) Vilhelm Bitner aperigi suplemente al ĝi ĉiumonatan revuon *Espero* kun paralelaj tekstoj en la rusa kaj en Esperanto. Bitner post unujara eldonado rezignis, ĉar esperantistoj apenaŭ helpis la revuon. Tamen la propaganda efiko de *Espero* estis granda, ĉar ĝin ricevadis (sen investo de esperantista kapitalo) preskaŭ cent mil abonantoj de *Vestnik Znanija*. Inter la dekmiloj da legantoj estis centoj da interesitoj pri Esperanto, kaj ili bezonis legi plu en la eklernita lingvo.

Tiun merkaton lerte utiligis Aleksandr Saĥarov, kiu post 15-jara laboro kiel financa oficisto en provinca urbetto, forlasis la ŝtatan servon kaj plentempe dediĉis sin al Esperanto. Utiligante sian partoprenon en la UKoj en 1906 kaj 1907, li vojaĝis tra kelkaj okcident-eŭropaj landoj kaj vizitis eldonejojn kaj librejojn en Berlino kaj Parizo. Li do decidis fondi en Ruslando Esperanto-librejon kaj -gazeton.

Aŭtune 1907 Saĥarov definitive establis sin en Moskvo. Estis formita redakta komitato de la estonta gazeto, preparita materialo por la unua numero. Ĉar en Moskvo ne ekzistis presejo kun la literoj Esperantaj, li decidis presigi la gazeton en Kazanjo, sed ties guberniestro ne donis permeson. Saĥarov do decidis dume fondi Esperanto-librejon. Post unu jaro Saĥarov konsentigis posedanton de negranda presejo mendi la literojn, kaj, ricevinte la oficialan permeson, li ekagis.

La unua numero de *La Ondo de Esperanto* aperis en februaro 1909 en la formo de tagjurnalo, en la eldonkvanto 10 mil ekzempleroj. Saĥarov anoncis pri *La Ondo* en ruslanda gazetaro, sendis ĝin al miloj da konataj adresoj kaj



disdonis ĝin al moskvaj gazetvendistoj (nur 20 ekzempleroj estis venditaj).

Zamenhof salutis la novan gazeton: Kun granda plezuro mi ricevis la unuan numeron de Via gazeto “La Ondo de Esperanto”. Dum eĉ plej malgrandaj nacioj havas sian Esperantan organon, la granda ruse-parolanta nacio restis en la lasta tempo tute sen organo; tial la apero de Via gazeto, kiu metas finon al tiu stranga kaj bedaŭrinda situacio, sendube estos ĝoje salutita de ĉiuj niaj amikoj. Mi deziras al Via gazeto la plej bonan prosperadon; mi esperas, ke Via energio kaj persisteco baldaŭ akiros por Via gazeto konfidon kaj estimon de la tuta esperantistaro kaj antaŭ ĉio kunlaboradon kaj subtenadon de ĉiuj esperantistoj rusaj. [Orig2: p. 2262]

Ne nur la bonega analizo de la konjunkturo sukcesigis la gazeton. Ĉar ĝi estis lia privata stablo, li — malkiel movada instanco — toleris la malprofiton de l’ gazeto, kiun kovris la profito de la librejo (t.e. libroservo + eldonejo):

Dum la unuaj monatoj... la gazeto estis donanta al ni sufiĉe grandan malprofiton, sed tio nin tute ne maltrankviligis, ĉar ni vidis, ke dank’ al ĝi nia klientaro de la librejo rimarkeble kreskis.

Pro la jubileo de *La Ondo* ni rompas la kronologion en ĉi tiu rubriko, sed ankaŭ ŝparas “nepran” jubilean artikolon. En marto aperos laŭplana prezento de *Lingvo Internacia*.

[Saĥarov A. *Rememoroj de centprocenta esperantisto*. M.: Impeto, 1993, p. 67]

Krome, *La Ondo* aperis akurate, ĝi ne incitis legantojn per neologismoj kaj miskompostajoj, nek tuŝis temojn religiajn aŭ politikajn.

La rubrikaro de *La Ondo* estis tradicia: “Esperanto en Ruslando”, “Esperanto eksterlande” (en la rusa lingvo), “Bibliografio”, “Diversaĵoj”, “Amuza fako”. Aperis beletraĵoj, felietonoj, artikoloj pri temoj sociaj kaj kulturaj, jaraj revuoj de la Esperanto-movado. La abonantoj jarfine ricevis senpage libron (*Princo Serebrjanij* de Aleksej Tolstoj, *Orienta Almanako*, 3a volumo de la *Plena Verkaro* de Devjatnin k.a.) En *LOdE* aperis unika serio de portretoj de pli ol cent famaj esperantistoj, ruslingvaj ĉefartikoloj kaj ... sentiĝis opoziciemo al la peterburgaj gvidantoj de Ruslanda Esperantista Ligo — Saĥarov ne povis levi sin super la tradicie malvarmaj rilatoj inter la “du rusaj ĉefurboj”.

Ekde 1910 *LOdE* estis eldonata ĉiumonate en la kutima revua formato en la eldonkvanto 2 mil ekz. Ĝis sia malapero ĝi restis la plej legata Esperanto-revuo en la lando, kvankam pluraj aliaj gazetoj aperis.

La 2a Ruslanda Esperanto-Kongreso (Kievo, aŭg 1913) decidis, ke *La Ondo* estu oficiala ruslanda organo esperantista kun *Pola Esperantisto* por Pollando kaj *Finna Esperantisto* por Finnlando.

Dum la Unua Mondmilito ĝi estis unu el nemultaj internaciaj ligiloj inter la esperantistoj. La ŝovinisma haladzo eĉ en la unuaj militaj monatoj preskaŭ ne sentiĝis en *LOdE*, kaj poste pri la milito memorigis ĉefe mortanoncoj pri pereintaj esperantistoj.

En la lasta kajero de *La Ondo* (№100–101, aprilo-majo 1917) Boris Kotzin profetis:

La ĵus okazinta revolucio garantios al Esperanto liberan propagandon... La devizo “Proletoj de ĉiuj landoj unuiĝu” necesigas alprenon de lingvo internacia, studebla de ĉiu laboristo.

Sed la etburĝan revolucion sekvis la bolŝevista. La privataj sendependaj revuoj ne povis ekzisti en la kondiĉoj de la “proleta diktaturo”. Ĉesis ankaŭ la “etburĝa” *Ondo*.

Ĝi fenikse renaskiĝis en 1991, kaj laŭ la kvanto de la aperintaj kajeroj (ĉi tiu estas 172a) la nova *Ondo* delonge superis sian antaŭulon, kaj iĝis pli internacia. Sed tio estas alia historio...

Halina Gorecka

Nia libroproduktado en la jaro 2008

Ĉiujarajn statistikojn pri la libroproduktado *La Ondo* reprenis en 1991 de *Hungara Vivo*, uzante informojn el la rubriko *Laste aperis* de la revuo *Esperanto*. Ĉi tiu rubriko listas ĉiujn librojn, kiujn la libroservo de UEA ekvendis en la aktuala jaro, sendepende de la eldonjaro. Ĉar ne ĉiu eldonita libro estas vendata de UEA kaj ĉar ne nur freŝe eldonitajn librojn ĝi ekvendis, ni aperigas ne nur jartabelojn, sed ankaŭ resumajn tabelojn, kiuj estas pli reprezentaj.

La tabelojn akompanas nur mallongaj komentoj, ĉar ili estas ĉiujare preskaŭ samaj (ankaŭ la supra enkonduko).

En la jaro 2008 en Esperantujo surmerkatigis 201 libroj, iom pli ol en la antaŭa jaro (184). Sed ili estis malpli ampleksaj, sume 25 mil 381 paĝoj (antaŭ unu jaro la sumo estis 31 mil 183 paĝoj). Danke al *Hungara Vivo* ni povas kompari kun la stato antaŭ 30 jaroj, en 1978, kiam aperis (= "laste aperis") 131 libroj sur 14 mil 529 paĝoj.

Ĉar en 2008 en *Laste aperis* denove mankis pliaj represoj de diverstemaj franclingvaj artikoloj de Edmond Privat, eldonejo de Tomasz Chmielik *Libro-Mondo* (kaj *Arĥivaro Edmond Privat*) ne estas en la jar-listo, kaj en ĝi la plej supran lokon la duan fojon sinsekve okupas la slovaka esperantisto Stano Marček, kiu daŭrigis eldoni divers-lingvajn versiojn de sia rekta-metoda lernolibro.

2008. Libroj

S.Marček (SK)	11
Ed. Iltis (DE).....	9
UEA (NL)	9
Mondial (US)	8
Leins (DE).....	7
W.Nüesch (CH)	7
FEL (BE).....	6
NAS (FR)	6
Impeto (RU)	5
La Blanchetière (FR)	5

2008. Paĝoj

Mondial	1786
ĈEE (CN)	1371
S.Marček	1256
FEL	1250
UEA	1007
Impeto	910
W.Nüesch	887
Harasybo (JP)	752
Fonto (BR).....	622
Ed. Iltis	603

Pro la menciita malaktiviĝo de *Libro-Mondo*, ĝi perdis la supran lokon en la resuma listo por 18 jaroj, kiun nun reokupis UEA. El la unua deko malaperis la usona eldonejo *Arizona Stelo* kaj enlistiĝis *Edition Iltis*, plejparte pro eldonaĵoj pri Volapuko kaj ties aŭtoro en la germana lingvo kaj en Esperanto. Sed *Libro-Mondo* retenas la unuan lokon en la paĝosuma listo. Nur kvin eldonejoj aperigas averaĝe almenaŭ unu libron ĉiusezone (t.e. 72 librojn dum 18 jaroj).

1991-2008. Libroj

UEA	134
Libro-Mondo (PL)	129
FEL	98
Fonto	79
Sezonoj (RU)	73
Impeto	67
KAVA-PECH	62
Bero (NL)	57
Ed. Iltis	56
ĈEE	53

1991-2008. Paĝoj

Libro-Mondo	16874
FEL	15556
UEA	15462
Fonto	12564
Arĥ. E.Privat (CH)	12553
Ludovikito (JP)	12085
Sezonoj	11938
ĈEE	11532
KAVA-PECH	11284
Impeto	10617

La altaj lokoj de Japanio (parte ankaŭ de Nederlando) estas ŝuldataj al la "kongresa fenomeno", pro kiu post unu jaro Pollando situos pli alte ol nun. Menciigis neniu libro el Bulgario, Hispanio, Serbio kvankam tie oni ja eldonas librojn, sed ili eble ne atingas Roterdamon.

2008. Libroj

Francio	25
Japanio	21
Nederlando	21
Germanio	20
Ruslando	14
Slovakio	11
Italio	9
Pollando	8
Usono	8
Brazilo kaj Svislando	7

2008. Paĝoj

Japanio	3326
Nederlando	2624
Ĉinio	2167
Ruslando	1847
Usono	1786
Francio	1681
Slovakio	1327
Brazilo	1318
Italio	1258
Belgio	1250

La resuma landolisto ne ŝanĝiĝis dum la jaro, kaj Germanio kaj Francio plu restas supre.

1991-2008. Libroj

Germanio	342
Francio	327
Pollando	287
Nederlando	263
Ruslando	216
Brazilo	200
Japanio	195
Usono	164
Italio	146
Belgio	132

1991-2008. Paĝoj

Germanio	41614
Francio	37648
Japanio	36225
Pollando	32990
Ruslando	31781
Brazilo	28645
Nederlando	28535
Svislando	22369
Italio	20719
Belgio	19623

En 67 libroj estis indikoj pri tradukiteco. Plej multaj tradukoj estis faritaj el Esperanto (12). Esperanten oni plej multe tradukis el la germana (11), franca kaj nederlanda (po 6). Pri la kvalito *Laste aperis* diras nenion, do legu recenzojn.

Aleksander Korĵenkov

	1991-2000, sume aŭ averaĝe	2001	2002	2003	2004	2005	2006	2007	2008
Nombro de libroj en/pri Esperanto	2107	222	174	224	183	159	204	184	201
Suma paĝonombro de ĉiuj libroj	251.276	31.520	26.451	28.424	27.295	23.780	30.078	31.183	25.381
Nombro de la eldonintoj	650	109	95	133	103	87	114	93	104
Averaĝa paĝonombro de unu libro	120.3	142	152	127	149	149	147	169	126
Averaĝa prezo de unu libro	Ž8,22	Ž11,2	Ž11,6	Ž10,3	Ž10,8	Ž12,7	Ž11,7	Ž12,0	Ž10,2
Lernolibroj, vortaroj pri Esperanto	296	32	43	42	25	19	32	36	29
Originala beletro	258	21	18	24	21	14	23	23	23
Traduka beletro	458	57	18	32	45	40	35	36	28
Planlingvistiko, esperantologio, ling.	229	26	19	15	13	22	21	21	32
Esperanto: historio, movado k.s.	241	21	42	33	32	27	29	28	26
Politiko, historio, filozofio, socio	166	22	11	28	21	22	29	13	28
Scienco kaj tekniko, terminaroj	182	17	8	16	10	4	10	8	8
Religio	105	6	10	17	6	6	13	9	13
Aliaj temoj	172	20	5	17	10	5	12	10	14

La plej bona raportisto

Chmielik, Tomasz. *Reala homo en la homa realo*. Ryszard Kapuściński (1932–2007). — Bydgoszcz: Skonpres; Świdnik: Libro-Mondo, 2008. — 56 p.


La plej bona raportisto de la mondo ...

... estis polo. Lia nomo: Ryszard Kapuściński. Li naskiĝis en 1932 en Pinsk, nun en Belorusio, sed tiam en Pollando.

Jam kiel knabo li spertis la efikojn de “granda politiko”, homoj malaperis dum la stalinista teroro sen evidenta kialo, ĉar la sekreta polico devis trovi anticipe difinitan debeton de malamikoj de la popolo. La rusan lingvon li devis lerni el pamfleto de Stalin. Tio estis la unua renkonto de Kapuściński kun la Rusa Imperio.

Post la milito Kapuściński studis historion en Varsovio. Tiam li ekenamiĝis en la antikvajn vojaĝpriskribojn de Herodoto, amo kiun li gardis dum la tuta vivo. La reĝimo tiam prokrastis la eldonon de la traduko. Kompreneble tio incitis la intereson de la scivolemaj studentoj. Jen, leginte inter la linioj ili trovis sufiĉe da paraleloj inter la tiranoj de antikveco kaj la tiutempaj diktatoroj.

Kapuściński komencis verki raportojn kaj skribis pri misaĵoj en Pollando. Tiutempe li rajtis vojaĝi nur enlande. Tial li petis translokiĝon al eksterlando kaj pensis, ke la redakcio eble sendus lin al Ĉeĥoslovakio aŭ simila lando, sed je lia granda surprizo li fariĝis korespondanto en Hindujo. Transiri la limon ne nur de unu lando al alia, sed de unu sistemo al alia fariĝis por li preskaŭ



metafizika sperto. Li vojaĝis al Hindujo tra Italio. Tre atente li notis la malsamaĵojn inter la itala kaj la pola vivmaniero. Lia plej grava problemo tamen estis, ke li ne parolis fremdajn lingvojn. Li klopodis instrui al si mem la anglan pere de iu romano de Hemingway. Poste la redakcio sendis lin al Ĉinio, kaj tie la minimuma kono de la angla ne helpis — li tute dependis de pli-malpli bonvolaj tradukantoj. La vojaĝo hejmen al Varsovio per la transsiberia fervojo ĝis Moskvo estis lia dua renkonto kun la Imperio.

Fine de la 1950-aj jaroj Kapuściński estis por la unua fojo en Afriko por raportoj pri la interna milito en Kongo. Li metis sian tutan animon en tiujn raportojn, venkis eĉ malarion kaj ne volis riski, ke la redakcio hejme en Pollando revoku lin. Kiel civitano de neriĉa lando, li ne povis, kiel la aliaj raportistoj, loĝi en luksaj hoteloj. Anstataŭe li estis

proksime al la popolo. Pro tiuj kontaktoj li ofte ricevis informojn pli frue ol la kolegoj. Tiun metodon por kapti informojn li ĉiam priskribas tre vigle, inter alie en siaj raportoj pri la “futbala milito” (jen termino el *Vikipedio*) inter Honduro kaj Salvadoro en 1969. Kiam io okazis ie, Kapuściński estis surloke. Li verkis pri la falo de potenculoj (Haile Selassie, Mohamed Reza Pahlavi kaj Idi Amin) kaj la degenero de reĝimoj, sed antaŭ ĉio pri homoj, kiuj per lia literatura metodo reliefigas kiel realaj personoj, ĉar ankaŭ li estis ...

... reala homo en homa realo

Kolego Tomasz Chmielik estas en nia movado sen ajna dubo la plej kompetenta por verki biografion pri Kapuściński. Li faras tion kun granda kono de la verkaro de Kapuściński. Plej detale skribas Chmielik pri la lastaj vivojaroj de Kapuściński. Sur p. 28 ni jam atingis la jaron 1990. Tio signifas, ke la dua duono temas pri la lastaj vivojaroj de Kapuściński sed ankaŭ pri ties ampleksaj libroeldonoj en la 1990aj jaroj. Chmielik klarigas la metodon de Kapuściński per ampleksaj citaĵoj. Ni spertas, kiamaniere Kapuściński akaparis konojn pri la teritorioj, tra kiuj li vojaĝis. Ĉiam lia ĉefa zorgo estis (en liaj propraj vortoj): “ĝis kia grado eblas penetri kaj ekkoni alian kulturon, se formas ĝin internaj, kaŝitaj kodoj, kiujn ni, venintoj el la alia mondo, ne sukcesos deĉifri kaj kompreni”. Danke al antaŭa peno de Tomasz Chmielik ankaŭ la legantoj de Esperantujo povas konatiĝi kun la metodo de Kapuściński, ĉar Chmielik tradukis lian libron pri Afriko.

La libreto de Chmielik estas granda eseo. Tamen foje li forgesas, ke ne ĉiuj legantoj nepre havas la saman anticipan konon (ekzemple ne ĉiu leganto en la okcidento necese scias “la ideojn de la pola Oktobro ‘56”). Kelkaj intertitoloj estintus bonaj por marki, kie en la biografio kaj verkaro de Kapuściński la leganto ĝuste sin trovas.

Tomasz Chmielik raportas pri renkonto, kiun li havis kun Kapuściński kaj notas, ke tiu ŝajne havis simpatian por la ideoj de Zamenhof. Danke al Chmielik ankaŭ la Esperanto-legantoj povas konatiĝi kun tiu homo, kiu ĉiam baraktis kun “vastegeco, diverseco kaj malsimpleco de ĉi tiu mondo” kaj kiu tamen sukcese klarigis tiun mondon, kaj kiu pro tio estis (laŭ la germana ĵurnalo *Der Spiegel*) “la plej bona raportisto de la mondo”.

Wolfgang Kirschstein

La Verko de la Jaro 2008: kandidatoj

Naŭ titoloj kandidatas por la PEN-premio *La Verko de la Jaro 2008*. Ili ricevis la subtenon de almenaŭ tri PEN-membroj por esti en la listo. La premion asignos la abonantaro de *Literatura Foiro* per referendumo ĝis 30 apr 2009. La aŭtoro de la premiita verko rajtos gastigi du semajnojn en kastelo Lavigny apud la Lemana lago. Temas pri prozaj verkoj surmerkigitaj en 2007 kaj 2008. Jen ili:

- *Bretonaj fabeloj* (volumoj 1 kaj 2) de Jean-Pierre Ducloyer
- *Ĉu vi konas Blaise Cendrars?* de Manuel de Seabra
- *Dio, psiĉo kaj mi* de Claude Piron
- *El ombro. Antologio de prozo el Rusio*
- *Kaj staros tre alte...* de Trevor Steele
- *Neokazinta amo* de Lena Karpunina
- *La regno de Kojikro* de Antoine Kouassi Kouablan
- *Sekreto de la patrino* de Valerij Sipoviĉ

HeKo

Ne perdiĝu nia generacio

La Perdita Generacio. Eksploĝigos vian domon. — **Donneville: Vinilkosmo, 2008.**

La sveddevena kaj nun internacia muzikgrupo *La Perdita Generacio* ĵus publikigis sian (ŝajne, la duan) diskon ĉe *Vinilkosmo* kun iom timiga titolo *Eksploĝigos vian domon*. La intrigo igas min atente aŭskulti ankaŭ la tekston kaj mi tuj komprenas ke la kanzonkolekto celas for de amuzo kaj nur agrabla tempopasigo.

La kantotekstoj (ĉefe far Tomas Q. Nilson kiu ankaŭ plejparte aŭtoras la muzikon) altiras per vortelekto kaj poezio, foje tre freŝa, kiel ekzemple en la dua titolo *Iamio bruliĝas*, kvankam ĝenerale min ne tiom ravas la rimoj kaj ritmoj (kiuj kadre de la muziko ne ĉiam facile distingeblas kaj ne bezonas tion, ĉu — en tia muziko...), kiom la enhavo mem.

La muziko estas apenaŭ klasigebla per io — soneble estas popo, iam tradiciaj elementoj el ies-popolaj kulturoj. La elekto de la muzikiloj estas leĝera kaj trafa, ĉu plukilaj aŭ blovaj. Iam sonas al mi ideoj el *Blackmore Nights* kaj Suzanne Vega, krom la etoso de la famega J. R. R. Tolkien (kiel el la instrumentaĵo el titolo *7 Fajro kamena*). Nu, ĉiel, sentatas la Eŭropa nordio. Iam mi eĉ ne povas distingi, kio ĝuste sonas (kaj ne konas iujn nomojn el la muzikillisto). Sed ne temas pri blinda imitado — la muziko estas perceptebla aŭtentika aŭtore, kun bonguste kaj ĝuste faritaj aranĝoj kaj selekto de muzikaj esprimivoj, varie de plenorkestraj ĝis kvazaŭ minimumecaj. Muzikŝatantoj trovos lerte pesitan selekton kaj integran unuecon de instrumentoj, voĉoj, ritmoj, ideoj, humoroj kaj io pli, ne ĉiam tuj kaptebla aŭ identigebla.

La tuta albumo havas “protestkantant” humoron, sed nur je unua vido de la verdula (naturkonservula) vidpunkto. La plenumantoj subtile sentas kaj liveras al ni laŭ ili neeviteblajn ŝanĝojn sociajn kaj surterajn, kiuj unuflanke dependos de la homoj mem kaj aliflanke povas dependi de io nerefuteble alproksimiĝanta — ŝtormo. Ĉu ni laĉiĝis de tiuj (revolucioj, krizoj...) aŭ ĉu ni dece kaj digne faru ventmuelilojn anstataŭ veterŝirmilojn? Ĉu ni restu “stultaj sklavoj” aŭ io mala, alia — sed kia, kial, kien? — Nepre ne “Malantaŭen”.

Iom da provokado — iam por iuj ŝajna troa — verŝajne estas tio kion la aŭtoroj neprigas por la aŭskultantoj.

Kvazaŭ polemikante kun sia propra grupnomo, la teamanoj klopodas eliri el la magia cirklo de “perditeco” — ni legas sloganon sur paĝo de la akompananta libreto “Ni estas generacio tiel perdita kiel ni agas!” — kaj sensi, trovi vojojn por havi kaj esti — sin mem, sian sorton, sian — nian mondon. Ja “perdita” generacio nomatas tiel ne per ĝi mem sed far tiuj “kontrolistoj”, kiuj perdis ĝin por siaj propraj ficeloj. Perifrazante tre saĝan eldiron “malbono ekzistas nur por tiuj kiuj estas ties viktimoj”, mi diru “nia generacio perdiĝos nur se ni permesos tion”. Evidente la rana bildo simbolas tiun malekzemplan por niaj pensadoj.



La tuta albumo impresas kiel koncepta albumo, komencante de la unua kanzono *Malantaŭen* proteste kontraŭ la nunaj kaj videble delongaj kontrolantoj/kontroliloj de la homa vivo, inkluzive la Biblio, timo, senjusta distribuo de valoroj, atakoj kontraŭ libero seksa, moŝtuloj, seksa diskriminacio de virinoj. Senkaŝa sarkasmo kontraŭ tiuj kiuj plej videble tiras nin regrese — kaj plu tra titoloj hokaj kaj atentigaj, ĝis la kvazaŭ rekta neevitebla demando — “Ĉu timigas la ombro?” kaj sensata **ŝanĝo** — kio burĝonas kaj iam “eksploĝigos vian domon”. Ĉu tro timige? Ĉu tro naive?.. La aŭskultanto serĉu siajn pensojn mem.

La unua hiphopa en Esperanto!

La hiphopa grupo *La Pafklik* eldonis fine de 2008 la unuan hiphopan albumon en Esperanto! Per altkvalita sono rekte el suburba Parizo, la du repistoj alĵetas acidajn, humurajn kaj politikajn vortojn. La albumo enhavas diversajn stilojn: de G-funka repo kun dolĉaj virinaj ritmenblusaj (R&B) voĉoj, rep-metala, ĝis hardkora stiloj. Fekbonaj kaj mojosaj* furorkantoj kiel *Bum bum kanabis*, *Komerca* kaj kompreneble *Fek al Esperanto*. Atentu, se vi ekaŭskultas, tiu albumo iĝos via drogo...

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd93&lng=e>



Flo!

* Mojosa estas la Esperanta ekvivalento de la angla “cool”. Simple: kunmetaĵo de la literoj Mo, Jo kaj So. **Mo** de Moderna, **Jo** de Juna, **So** de Stila.

Literatura konkurso Liro-2008

La juĝkomisiono de la tradicia literatura konkurso *Liro-2008* (Aleksej Birjulin, Sten Johansson, Wolfgang Kirschstein, Aleksander Korĵenkov, Alen Kris, Valentin Melnikov, Petro Palivoda), organizita de La Ondo de Esperanto, ricevis 36 konkursaĵojn de 26 aŭtoroj el 15 landoj: Brazilo, Britio, Burundio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irano, Italio, Kazahŝtano, Pollando, Rumanio, Ruslando, Ukrainio, Usono. (Pasintjare partoprenis 24 konkursaĵoj de 20 aŭtoroj el 7 landoj.)

La rezulto de Liro-2008

Originala prozo

Laŭreato: **Mihail Korotkov** (Ruslando) pro *Io devas okazi*.

Laŭdaj mencioj: **Paul Gubbins** (Britio) pro *Reumuiĝo*;

Lenke Szász (Rumanio) pro *Tatjana*.

Originala poezio

Laŭreato: **Ljudmila Orajevskaja** (Ukrainio) pro *Vintro*.

Laŭdaj mencioj: **Alona Akimenko** (Ruslando) pro “Mi deziras atingi l’ ĉielon...”; **Benoît Philippe** (Germanio) pro *Triptiko por patro kaj Triptiko por patrino*.

Traduka poezio el la rusa lingvo (*Druzjam* de Pjotr Vjazemskij)

La konkurso ne okazis, ĉar venis nur unu konkursaĵo.

Traduka prozo el la rusa lingvo (*Bemoj* de Valerij Brjusov)

La premio ne estas aljuĝita, ĉar partoprenis nur du konkursaĵoj.

Laŭda mencio: **Anna Pentus** kaj **Mati Pentus** (Ruslando).

Traduka prozo el la angla lingvo (*Aloha Oe* de Jack London)

Laŭreato: **Scott Page** (Usono).

Laŭda mencio: **Russ Williams** (Pollando).

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. Konforme al la regularo la organizantoj ĝis la 1a de januaro 2011 havas ekskluzivan rajton publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike.

Gratulon al la laŭreatoj! Dankon al la partoprenintoj!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro-2008*

Ljudmila Orajevskaja

Vintro

*Dormas neĝamasoj ondaj
kaj arbustoj en la kort’.
Kiel blankbarbuloj oldaj
Stakoj staras sur la bord’.*

*Apudkuras voj’ rumora,
malaperis pala sun’.
Kiel se gardist’ rigora
la felĉapa venis lun’.*

*Erupciis svarme steloj
sub la vasta noktkupol’.
Sur viburn’ kun ruĝaj beroj
revas pri maten’ pirol’.*

Salutenda eldono

Марчек, Стано. Эсперанто прямым методом / Пер. с эсп. Бронислава Чупина; Ил. Линды Марчековой. — Мартин: С. Марчек, 2007. — 114 с., ил.

Laŭ la opinio de kelkaj movadanoj, la lernolibro de Stano Marček estas “furora”... Mi ne legis la libron antaŭe, do estas bona ebleco konatiĝi kun ĝi kaj vidi, kion furoran ĝi enhavas...

La leganton salutas unupaĝa antaŭparolo de la aŭtoro, kiu prezentas la libron kiel porinfanan kaj donas rekomendojn pri ĝia uzado. La rusa lingvo aperas en la libro ne ofte — krom la antaŭparolo nur en kurtaj gramatikaj klarigoj kaj en la (ambaŭdirekta) vortareto.

Tio estas avantaĝo de la libro kaj tute komprenebla afero, ĉar ja temas pri rekta metodo. La signifo de leksemoj kaj gramatikeroj klariĝas per bildoj kaj per vortoj jam konataj el antaŭaj lecionoj.

Amaso da bildoj aparte bonas por infanoj — la aŭtoro bone konas pedagogian psikologion, kiu diras al ni, ke 30% da infanoj havas nur la bildan pensmanieron, 45% uzas la bildan kaj abstraktan-logikan, kaj nur 25% uzas plejparte la logikan pensadon kun aldono de la bilda.

Enestas kelkaj ludoj kaj ludsimilaj taskoj — ekzemple, oni devas kolorigi desegnaĵon konforme al teksto, en kiu priskribatas la koloro de la vestaĵoj de la figuroj en la bildo. En la manoj de sperta instruisto la libro fariĝos vere brila ilo, kiu enuigos nek lernantojn, nek la instruiston mem. Ankaŭ neprofesiaj instruistoj (kiuj ofte gvidas Esperanto-kursojn) profitos de ĝi — interesa libro kun riĉa bildaro kaj ekzercaro allogos lernantojn per si mem kaj plifaciligos la laboron. La libro bone taŭgas ankaŭ kiel helpilo dum memlernado.

Ĝenerale notindas la grafika organizo de la lernolibro. Inter multaj ilustraĵoj estas bone organizita la teksto kun uzo de la atentigaj kursivo kaj graseto. La aŭtoro ankaŭ uzas simbolajn signojn por divers-specaj lernaktivecoj. Ĉi tio faras orientiĝon en la materialo de la libro facila kaj agrabla. Malgranda malavantaĝo estas la modesta nigra-blanka kolora decido, kiu verŝajne havas kialon ne konceptan, sed financon.

Fine de la libro proponatas la paĝo kun adresoj de retaj priesperantaj fontoj, kiuj instigas lernantojn eniri la Esperantomondon kaj ne resti izolitaj. Troveblas ankaŭ ilustritaj afiŝoj-tabeloj: komence de la libro — alfabeto, fine — prepozicioj. Ambaŭ estas kopiindaj objektoj — ĉu kiel hejma murbildo, ĉu kiel bildo en la klaso.

Do, la lernilo estas sendube bona. Tre salutendas la ruslingva eldono: jam ekzistantaj ruslingvaj lernolibroj de malmultaj aŭtoroj havas limigitan kvanton, kutime ili orientiĝas al plenkreskuloj kaj al infano ili ŝajnas sekaj, enuigaj kaj malentuziasmigaj. Nun oni havas pli da elekto!

Oksana Burkina

Ne forgesu (re)aboni

“La Ondo de Esperanto” en la jaro 2008

La centjariĝon de *La Ondo de Esperanto* de Aleksandr Saĥarov nia *Ondo* renkontas kun rekorda nombro da abonantoj. Danke al la fideleco de niaj legantoj, danke al la bona laborado de niaj perantoj (kaj eble danke al la tarifo, kiu pasint-jare ne altiĝis), en la jaro 2008 *La Ondo* ricevis 573 abonkotizojn, je 34 abonoj pli multe ol en 2007, kaj je 28 abonoj pli multe ol en la jaro 2006 kiam 545 personoj — plej multe ĝis nun — abonis nian magazinon.

	1998	1999	2000	2001	2002	2003	2004	2005	2006	2007	2008
Ruslando	147	133	122	115	101	98	104	92	93	91	95
Aliaj landoj	136	170	238	257	305	407	421	450	452	448	478
Entute	283	303	360	372	406	505	525	542	545	539	573

En plej multaj landoj la abonstatistiko kresk(et)is aŭ ne ŝanĝiĝis. La plej granda kresko estas en Hispanio (+7). Bona kresko estas en Serbio, kie la abonantaro duobliĝis de 6 al 12 (+6), kaj en Brazilo (+5). Maltrankviligas nin la malkresko en Germanio (-7) kaj en Svedio (-3). Entute, *La Ondo de Esperanto* pasint-jare estis legata en 53 landoj, ankaŭ tio estas nia rekordo.

Jen landoj kun pli ol dek abonantoj (enkrampe estas la nombroj por 2007):

Ruslando	95 (91)	Britio	24 (23)
Pollando	62 (59)	Hispanio	22 (15)
Francio	41 (38)	Svedio	18 (21)
Germanio	32 (39)	Belgio	17 (19)
Finnlando	28 (28)	Serbio	12 (6)
Brazilo	25 (20)	Danlando	11 (8)
Italio	25 (22)	Litovio	11 (7)
Usono	25 (23)	Japanio	11 (13)

La ĝojon pri la rekordo amarigas la antaŭscio, ke en 2009 nia abonantaro malkreskos. En la kondiĉoj de la monda krizo falas ne nur aĉetoj de aŭtoj, loĝejoj kaj luksaĵoj, sed ankaŭ de “kulturaj varoj”. Ĉi tion ni konstatas en la venantaj abonlistoj. Ĉu ni sukcesos denove havi pli ol 500 abonantojn? Eble jes, se laŭeble multaj nereabonintoj, traleginte ĉi tiun tekston, tamen decidis spiti la cirkonstancojn kaj reaboni. Se pri *La Ondo* oni pli aktive informos en kluboj kaj en renkontiĝoj. Se nia Abonhelpa Fonduso ricevos rimedojn por abonigi tiujn, kiuj mem ne povas pagi.

AIKO

Ricevitaj libroj

Adresaro de SAT 2008. — Paris: SAT, 2008. — 48 p. — [Donaco de SAT].

Chmielik, Tomasz. *Reala homo en la homa realo*. Ryszard Kapuściński (1932–2007). — Bydgoszcz: Skonpres; Świdnik: Libro-Mondo, 2008. — 56 p. — [Recenzoekzemplero].

Giŝpling, Mikaelo. *Vespere: Nova poemaro / Enkond*. Vladimir Samodaj. — M.: Impeto, 2008. — 128 p.; 400 ekz. — [Donaco de Svetlana Smetanina].

Jarlibro de Rusia Esperantista Unio 2007. — M.: REU, 2007. — 32 p. — [Aĉeto].

Koutny, Ilona; Brosch, Cyril; Jaskot, Maciej; Vogt, Horst. *Germana-Esperanta-Pola etvortaro pri Lingvo kaj Komunikado*. — Poznań: Prodruc, 2008. — 143 p. — [Donaco de Ilona Koutny].

Lukjanec, Dina. *Tremanta stelo: Kantoj, versoj, tradukoj / Komp.*, antaŭpar. Mikaelo Bronŝtejn. — M.: Impeto, 2008. — 96 p.; 300 ekz. — [Donaco de Svetlana Smetanina].

Ricevitaj gazetoj

Aktuala Esperanto, 2009/1; Dia Regno, 2008/1,3,4,5; EAB Update, 2009/44; Esperanta Finnlando, 2008/6; Esperanto, 2008/12; Esperanto aktuell, 2008/6; Esperanto sub la Suda Kruco, 2008/6; Frateco, 2008/82; Ĝenerala Informilo, 2008/152; Heroldo de Esperanto, 2008/15; Internaciisto, 2008/4; Juna Amiko, 2008/3; KAE-Informilo, 2009/65; Kataluna Esperantisto, 2008/347; La Gazeto, 2008/139; La KancerKliniko, 2008/128; La Movado, 2008/694; La Ondo de Esperanto, 2009/1; La Revuo Orienta, 2008/11; La SAGO, 2008/48; Literatura Foiro, 2008/236; Mikrofono, 2008/22,23; Monato, 2009/1; Norvega Esperantisto, 2008/6; REGo, 2008/6; Scienco kaj Kulturo, 2008/5; Sennaciulo, 2008/11-12; Usona Esperan-

Gazetoj

Spegulo. Vintro 2008

La vintra kajero de *Spegulo* fermas la unuan jarkolekton de ĉi tiu nova soci-kultura periodaĵo. Lidia Liĝeža en la redaktora rubriko resumas la jaron 2008 kun speciala atento al la aŭtunaj aktivajoj en Poznań.

Pola historiisto, politikisto kaj EU-parlamentano Bronisław Geremek estas omaĝata per publikigo de lia artikolo *Eŭropo de multaj patrujoj* aperinta pasintsomere en *Gazeta Wyborcza*. La tradukon komplementas lia biografio.

La judan temon ĉi-kajere daŭrigas biografia eseo de Romuald Jakub Wexler-Waszkinel, filozofa el Lublino, en la lastaj jaroj aktiva pledanto por la religia dialogo inter judoj kaj kristanoj. Kontribuo de Birthe Lapenna memorigas, ke 2009 estas duoble Jubilea jaro: la 150a datreveno de Zamenhof kaj la 100a de Ivo Lapenna.

Andreas Künzli intervjuas Gonçalo Neves kaj Robert Pontnau pri “Ĉu Esperanto povas lerni ion de la sorto de Ido?” La jaro 1968 estas kiel simbolo de plej diversaj, ĉefe maldekstre (aŭ kontraŭburĝe) orientitaj studentaj kaj civitanaj movadoj el la sesdekaj jaroj. Tiujn eventojn Künzli analizas en “1968 — ĉu nur duona revolucio?”

H. Gilles esperantigis fragmentojn el *Ourania* de Le Clézio, kiu aperas kun komento de Tomasz Chmielik pri la nobel-premiita verkisto. En la kompilaĵo, titolita “Jom-Kersa-Mun kaj *négritude*”, estas prezentita unu el la “intelektuloj de la reala politiko”, Léopold Sédar Senghor, dum 20 jaroj prezidento de Senegalio. Kelkaj liaj poemoj donas imagon pri la poezia verkaro de tiu ribelulo.

Halina Gorecka

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net


Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la decembra tasko *Metanagramoj* venis 18 respondoj, sed 7 personoj ne atentis la priskribojn de la serĉataj vortoj (ekz-e, tono estas muzika sono, sed ne signo). Tute ĝustajn respondojn sendis: Edmund Grimley Evans, Brennus Legranus (Britio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Hans-Burkhard Dietterle (Germanio), Jean-Marie Ries (Luksemburgio), Dorota Burchardt, Zbigniew Czupkałło, Hanna Skalska (Pollando), Bronislav Ĉupin (Ruslando), Roland Larsson (Svedio).

La loto donis libropremion al *Hans-Burkhard Dietterle*. Ni gratulas!

La ĝustaj respondoj: 1. on-not-nokt-konat-narkot; 2. ol-kol-klon-kolon; 3. re-ter-kret-sterk.

Krucvortenigmo



Horizontale: 1. Mankas ... en lia kapo (=li estas frenezeta); 4. Vinbera suko; 8. Pinglarbo; 10. Malĝuste opinii (R); 12. Atmosfera tegaĵo de Tero; 13. Ludkarto; 15. Infano; 17. Kemia elemento B; 18. Estimata ofico, asignita al iu; 19. Malgrandegulo el fabeloj (R); 22. Delikata ŝtofo; 23. Everesto, Elbruso estas tio. 25. Sin ĵeti en akvon (R); 26. Ŝaŭmvino; 27. Universala kuracilo; 31. Juvelŝtono (R); 32. Kanta teatraĵo; 33. Nimfo de arboj (R); 34. Antikva muzikinstrumento aŭ boreala konstelacio; 36. Virino de la nigra raso; 39. En la pluraj religioj: ekzistaĵo kiun havas ĉiu homo dum la vivo kaj post la morto de la korpo (R); 41. Unuo de elektra rezistanco; 44. Siberia rivero; 45. La plej granda monto en Afriko; 47. La unua, dua, ...; 48. Korta naĝbirdo (R); 49. Delikata, agrablaodoro; 50. Esti movata tien kaj reen de malfortaj skuetoj.

Vertikale: 1. Tuŝo per la lipoj (R); 2. Sorto, fatalo; 3. Larĝa bordo de lago, maro, rivero aranĝita por akceptado de feriantoj; 5. Knabino, kies patro aŭ patrino mortis (R); 6. Planedo inter Venuso kaj Marso; 7. Valora metalo uzata en juvelarto; 8. Tenilo de poto, kruĉo; 9. =Malproksima; 11. Li estas la kvina ... ĉe veturilo; 13. Profundego (R); 14. =Timpano; 15. Loĝanto de insulo Sumatro; 16. Honora respekto; 20. Verki muzikaĵon; 21. Aklami; 23. Malsana emo; 24. El maraj krustacoj; 28. Montara ĉeno inter Eŭropo kaj Azio; 29. Vintra monato (R); 30. La unua viro sur la Tero; 35. Kopii (R); 37. Divendenda demando (R); 38. Sesangula floketo el neĝo (R); 40. Sankta birdo de la antikvaj egiptoj (R); 42. Ceremonia kapvesto de la papo (R); 43. Elektra veturilo por urbaj pasaĝeroj (R); 45. ... estas via laboro, tia estas via valoro; 46. Al la buŝo de ... neniu povas ordoni.

Kompilis **Viktor Alikin**

La respondoj venu al la redakcio antaŭ 10 mar 2009.

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Buller, nur ero de la ĝeno

Osmo Buller, Ĝenera Direktoro de UEA (subskribo de Osmo Buller, <http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/12241>, 9 jan 2009)

“Kaj jen - la Bub’ englitis!” (Kalocsay)

Esperanto is the best way to open your mind to the whole world. Mi bubtenas Esperanton. (Michèle Côté, http://www.change.org/ideas/view/introduce_esperanto_as_a_foreign_language_subject_in_schools, 7. jan)

Melku min, sinjorino, aŭ: Eksa sekso?

Festo de melkado en valo de Pas... Temas pri ekshibicio de tradiciaj iamaj metodoj. (Komento de la aŭtoro Manuel Pancorbo, <http://www.ipernity.com/doc/mpancorbo/3272444>)

Kantoj feaj kaj aliaj

Fikantoj por ebria vespero (*Norda Kantaro*, kvina kajero, fare de Martin Strid, <http://e-g.se/t315>; rimarkis Maria Sandelin)

Ĉu taŭga pozicio?

Ĝis nun seksaj laboristoj en Koreio kuŝas en nenormala eksterleĝa kondiĉo. (Amelano. *Fragmentoj pri la sekso-laborista movado* // Sennaciulo, 2007, №1, p. 4)

Ĉu baldaŭ Baltarabio?

Ĉu la civitano de Israelo ŝuldas sian lojalecon al iu araba, eĉ estone probabla sendependa palestina ŝtato...? (Vinko Oŝlak. *La vera problemo de etnaj minoritatoj* // Interkultura dialogo kaj komunikado. Maribor: EEU, 2008. p. 81)

Eldono senilejen?

<En 2007 aperis la sekvaj publikigaĵoj>: ... la Paŝo Senerilejen (Codjo) (*Vertikale*, 2008, №38, p. 19.)

Plukis **István Ertl**

La plej nova mono estas Mono

La Sennacia Banko fieras anonci sian unuan aŭkcion ĉe eBay. 1000 Monoj estas vendotaj, t.e. dek monbiletoj de 100 Monoj. Mi ege scivolas pri la valoro, kiun la merkato aldonos al nia monunujo! La lanĉo de Mono estis granda sukceso. Mi ŝatus danki ĉiujn investantojn kaj subtenantojn, kiuj verigas nian sonĝon de monda monunujo.

Daniel Salomon

Direktoro de la Sennacia Banko
www.heliko.org



Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

Argentino: Roberto Sartor, Beruti 2792, 3° 9, C 1425, BBF, Buenos Aires

Aŭstrio: Leopod Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio: FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

Brazilo: BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

Britio: EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

Bulgario: Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

Estonio: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

Finnlando: EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

Hungario: HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Islando: IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

Italio: IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

Japanio: JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-to, 162-0042

Katalunio: KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

Kroatio kaj Slovenio: Višnja Branković (vd. Italio)

Latvio: Margarita Želve, Râpniecšbas 35-13, LV-1045 Ršga

Litovio: LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

Nederlando: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

Nov-Zelando: G.David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch, NZ-8025

Pollando: PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

Portugaliao: PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

Ruslando: Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

Serbio: Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

Sud-Afriko: Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

Svedio: Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

Usono: ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



Pollando. La 12an de januaro en Pollando oni malofte vidis personon sen la ruĝkora insigno de la Granda Orkestro de Festa Helpo (vd. p. 8). Kaj en la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof, Bjalistoko, esperantistoj tiutage aldonis al la ruĝa koro la verdan standardon. (Iwona Gołko)



EsperantoLand. La sepa Novjara Renkontiĝo de EsperantoLand en Frankfurto ĉe Majno (vd. p. 13) enhavis programon por infanoj kaj junuloj de mateno ĝis vespero, kun pluraj metiaj, distraj, sportaj, eksperimentaj, dancaj, kantaj, muzikaj, filmaj, verkaj kaj aliaj programeroj. (Katalin Kováts)



Germanio. Aktivuloj de Esperanto-Societo-Neubrandenburg (ESN) starigas siajn informtabulojn en la vendocentroj de la urbo, aktive alparolas homojn kaj disdonas centojn da flugfolioj. Sur la foto: Rene Philip kaj Maik Becker el ESN en la vendocentro *Lindenberg*. (Werner Pfennig)



Internacia Fotokonkurso

“La Ondo de Esperanto” organizis en 2008 la 11an Internacian Fotokonkurson. Partoprenis 117 verkoj de 24 aŭtoroj el 13 landoj: Brazilo, Britio, Francio, Hispanio, Hungario, Germanio, Koreio, Nederlando, Pollando, Ruslando, Serbio, Svedio.

La 13an de januaro 2009 la juĝkomisiono anoncis la rezulton.

1a premio (50 eŭroj kaj abono al “La Ondo de Esperanto”): Olga Ŝipovalenko (Ruslando) pro “La nesto”.

2a premio (25 eŭroj kaj abono al “La Ondo de Esperanto”): Vladimir Merkulov (Ruslando) pro du pejzaĝoj.

3a premio (abono al “La Ondo de Esperanto”): Bang Jee-Young (Koreio) pro “Horo de vojaĝanto”.

Laŭdaj mencioj: Helena Dorota Burchardt (Pollando) pro “Ripozo”; Mathias Bethmann (Germanio) pro “Fiŝisto kun boato” kaj “Sunsubiro dum *nokto de palacoj* en Potsdam”; Federico Faccio Peláez (Nederlando); José María Salguero Rodríguez (Hispanio) pro “Kontraŭsune”.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono al “La Ondo de Esperanto”) pri la temo *Vizaĝoj*: Nebojša Stanković (Serbio) pro “Studenac 2” (la supra foto).

Laŭdaj mencioj: Barbara Chodera (Pollando) pro “Istanbulo – feliĉa homo”; Aleksej Kozlov (Ruslando) pro “Kolazono”; Andrea Ottrok (Hungario).

Dankon al la partoprenintoj! Gratulon al la laŭreatoj!

Halina Gorecka
sekretario de la konkurso